

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

BOTEV-
TAGOJ '86

•
POR MALAR-
MADO
KAJ SEKURECO

•
100 JAROJN
ESPERANTO

•
JUNA
ESPERANTISTO

•
LINGVAJ
DEMANDOJ

•
NIA INTERVJUO

•
NI RECENZAS

•
ORIGINALA
VERKARO

•
TRA LA MONDO



МАЛАРИО, ЗА ТЕБЕ ТЕ УМРЯХА,
ЕРНА БЕРИ ДОСТОЙНА ЗАРАД ТЯХ
И ЗА ТЕ ДОСТОЙНИ, МАЙКО, БЯХА.

INSPIRITAJ DE LA BOTEV-INTERNACIISMO



Solena malfermo de la konferenco „La internaciismo de Botev kaj nia nuntempo“

Foto: Hristo Metev

La esperantaj arandojn en la kadroj de Botevtagoj' 86 pliriĝis la organizitaj de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Distrikta Estraro de BEA en Vraca la 26-an kaj 27-an de majo j. k. du gravaj internaciaj ĵurnalistaj arandoj: Esperanto-konferenco pri temo „La internaciismo de Hristo Botev kaj nia nuntempo“ kaj Renkontiĝo-konsultigo de redaktoroj de esperantaj eldonoj el la socialismaj landoj pri temo „La esperantista gazetaro serve al la mondpaco“.

La 26-an de majo matene en la Klubejon de la aktivaj batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo en Vraca venis multaj bulgaraj kaj alilandaj ĵurnalistoj-esperantistoj kaj kunlaborantoj de esperantaj eldonoj. Ĉeestis: la heroo de socialisma laboro Hristo Gorov, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, ĵurnalist-veterano; la merita aganto de kulturo Nano Kjuĉukov, vic-prezidanto de BEA; la heroo de socialisma laboro Nikola Aleksiev, honora prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), ĵurnalist-veterano; Stojan Pavunĉev, prezidanto de DE de BEA en Vraca; Radoslav Triĉkov, esperantisto-veterano; d-ro Arpad Mátthe, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, ĉefredaktoro de „Budapeŝta Informilo“; Barbara Pietrzak, ĉefredaktorino de „Pola Esperantisto“ kaj redaktorino en la Esperanta Redakcio ĉe Radio Polonia (Pollando); Manfred Arnold, membro de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio de GDR, reprezentanto de gazeto „Der Esperantist“; Clément Tholet, Ĝenerala Sekretario de MEM, ĉefredaktoro de revuo „Nia Voko“ (Belgio); Violin Oljanov, ĉefredaktoro de gazeto „Paco“, organo de MEM; Ivan Kere-midĉiev-Esperov, vicprezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA), ĉefredaktoro de gazeto „Internacia Ĵurnalistoj“; Draguŝko Petrov, ĉefredaktoro de revuo „Interligilo“, organo de Internacia Poŝtista kaj Telekomunika Esperanto-Asocio (IPTEA); Ŝterju Kukuŝev, ĉefredaktoro de „Internacia Agrikultura Bulteno“, organo de Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio; Donĉo Hitrov, Ĝenerala Sekretario de TEJA, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“; Georgi Mihailkov, respondeca redaktoro de la eldono de BEA, redaktoro de la bulteno „Esperanto Progresas“; Slavĉo Davidov, ĉefredaktoro de bulteno „Esperanto-Informo“; Veselin Rizov, ĉefredaktoro de bulteno „Asocia Informo“, korespondantoj de ĉefurbaj ĵurnaloj, de la radio kaj televido, ĵurnalistoj

el la distrikta ĵurnalo „Oteĉestven zov“ (Patrolanda Voko), kunlaborantoj de esperantaj kaj nacilingvaj eldonoj, aktivuloj de esperantistaj societoj en Vraca, k. a. Kiel gastoj ĉeestis ankaŭ kelkaj alilandaj esperantistoj: Lothar Müller el GDR, Jozef Madaras, sekretario de Hungara Esperantista Junularo, János Balla, estrarano de HEJ, kaj Lajos Csonka el Hungario.

Per korvarmaj salutvortoj sin turnis al la partoprenantoj Hristo Gorov. Li alte pritaksis tiujn iniciatojn, kiel gravan kontribuon de esperantistaj ĵurnalistoj el la socialismaj landoj en la batalo por konservo de la mondpaco, de la vivo sur la terglobo, de la homa civilizo. „La esperantistaj ĵurnalistoj — li emfazis — estas en la unuaj vicoj de la pacdefendantoj, kiuj luktas kontraŭ la minaco de nuklea milito, kontraŭ la imperiismaj militemuloj, por paca kunlaborado inter la popoloj. Via laboro estas nobla kaj nia renkontiĝo en Vraca koincidas kun la celebrado de la heroo pere de Hristo Botev — titano de la bulgara naciliberiga batalo, ekzemplo de patrioto, poeto kaj publicisto. Lia fero inspiras ankaŭ nian laboron, al kiu mi deziras plenan sukceson“.

En sia majstre verkita raporto „La internaciismo de Hristo Botev“ Nikola Aleksiev kaptis la atenton de la ĉeestantoj per interesaj komparoj inter la verkoj de la ĵurnalistoj Botev, kreitaj antaŭ pli ol 110 jaroj, sed aktualaj ankaŭ hodiaŭ, kaj la gravaj problemoj de nia nuntempo.

„Botev partoprenis la naciliberigan batalon por renverso de la kvinjarcenta otomana ĵugo kaj por kreo de sendependa bulgara ŝtato kiel poeto, publicisto, redaktoro de revoluciaj gazetoj. Li restis en la memoro de la progresema parto de la bulgara popolo kiel genia poeto kun monda signifo, kiel arda organizanto de nacia revolucio. Li estigis standardo de ĉiuj revoluciaj kaj demokrataj movadoj en Bulgario, inspirante ilin per sia ideo kaj persona ekzemplo...“

Por la bulgaraj ĵurnalistoj Hristo Botev plu estas ideala tipo de ĵurnalistoj. Per la eldonataj kaj redaktataj de li gazetoj Botev luktis por solvo de la plej tiklaj problemoj de sia epoko. Li bonege scipovis kunligi la aktualajn problemojn de la kuranta politika momento kun gravaj principaj problemoj, kiuj eĉ hodiaŭ restas

(Sekvas sur p. 3)



Por nuklearmala malarmado kaj sekureco

DEKLARACIO

de la Parlamento de Popola Respubliko Bulgario lige kun la
Internacia Jaro de la Paco, akceptita la 21-an de marto 1986

La 24-an de oktobro 1985 la Organizaĵo de la Unuigintaj Nacioj solene proklamis la jaron 1986 Internacia Jaro de la Paco kaj en la unanime akceptita tiukaze Deklaracio adresis alvokon al ĉiuj popoloj aligi al la klopodoj de UN por konservo de la paco kaj estonto de la homaro.

La Parlamento de Popola Respubliko Bulgario salutas tiun ĉi gravan decidon de la monda organizaĵo kaj subtenas la fundamentajn celojn kaj programojn de la Internacia Jaro de la Paco. Ĝia proklamo plene respondas al la klare esprimita volo de la popoloj de ĉiuj kontinentoj vivi en paco kaj sekureco, por atingi turnopunkton en la batalo por brido de la vetarmado, provokita fare de Usono kaj NATO, kaj por preventi militarismigon de la Kosmo.

Ni vivas en maltrankvila tempo, kiam super la homaro pendas minaco de nuklearmala incendio. Do necesas, ke antaŭ ol estiĝis malfrue, oni eltrovu konkretajn kaj efikajn rimedojn por konservo de la paco, por ĉesigo de la vetarmado kaj por alpaŝo al reala malarmado.

Historian signifon por konservo de la paco kaj sekureco sur nia planedo havas la Deklaracio de la Ĝenerala Sekretario de CK de la Komunista Partio de Sovetunio M. S. Gorbaĉov de la 15-a de januaro k. j., kiu entenas detalan kaj laŭtapan programon por likvido ĝis la fino de nia jarcento de la amasdetrua armilaro, por prevento de la militdangero. Tiu ĉi unika laŭ siaj karaktero kaj enhavo dokumento proponas totalan koncepton kaj konkretajn praktikajn rimedojn por radikala sanigo de la internacia situacio. La programo estas pruvo pri la celoj, kiujn USSR starigas al si sur la internacia

areno, pri ĝian ĉancelebla strebado al paco. Ĝi estas elokventa ekzemplo de novaj politikaj pensmanieroj kaj konduto, necesaj en la nuklearmala erao, pri tio kiel iu granda ŝtato devas kompreni sian specialan respondecon por la sorto de la hodiaŭa kaj la morgaŭa generacioj.

La Parlamento kaj la tuta bulgara popolo senrezerve subtenas la ampleksan kaj radikalan programon por nuklearmala malarmado, por likvido de ĉiuspecaj amasdetruaj armiloj, kiun entenas la Deklaracio de M. S. Gorbaĉov. Ĝia efektivigo estas la sola racia alternativo, staranta hodiaŭ antaŭ la popoloj. Tio ĉi estis kategorie konfirmita en la finiginta antaŭ nelonge Dudeksepa kongreso de KPSU, kiu difinis la bazajn direktojn de la soveta ekstera politiko dum la sekvantaj jaroj en la batalo por paco kaj sekureco en la mondo. La deklaritaj en la politika raporto de CK de KPSU principaj konsideroj por kreo de ampleksa sistemo de internacia sekureco montras la vojon, kiu devas esti sekvata por sankcii la pacan kunekzistadon kiel superan universalan principon de la interŝtataj rilatoj. Popola Respubliko Bulgario, en intima kunagado kun la landoj de la socialisma komunismo, en kunlaborado kun ĉiuj pacamaj kaj progresemaj fortoj de la planedo, maksimume kontribuados por atingi de la fina celo; ke la homaro renkontu la dudekunuan jarcenton sen nukleaj, kemiaj kaj kosmaj armiloj, liberigita de la militminaco.

La Parlamento konsideras, ke estas necese entrepreni decidajn agojn jam nun — dum la Internacia Jaro de la Paco. La komenciĝinta soveta-usona dialogo sur alta nivelo naskis cer-

tajn esperojn pri sanigo de la internacia situacio kaj montris, ke ekzistas eblecoj por reciprokaj kontaktoj en diversaj vivosferoj. Bedaŭrinde, la respondo de Usono al la lastaj sovetaj proponoj ne montras seriozajn intencojn pri praktika solvado de la problemoj, ligitaj kun la nukleaj kaj kemiaj armiloj. La monda publiko atendas de la administrantaro de Usono politikan realismon kaj bonan volon por atingi de konkretaj rezultoj.

Trege necese estas, ke dum la intertraktadoj estu ellaboritaj konsiderindaj kaj efikaj interkonsentoj, kiuj metu solidan barieron antaŭ la vetarmado kaj preventu ĝian transiron en la Kosmon. Tio ĉi liberigus grandegajn rimedojn por konstruaj celoj, precipe helpe al la popoloj, batalantaj kontraŭ sia ekonomia postrestiteco.

Lige kun la Internacia Jaro de la Paco la unuaj gvidantoj de PR Bulgario kaj de SR Rumanio adresis komunan alvokon por transformo de la Balkana Duoninsulo en zonan liberan de kemia armilaro. Tiuj ĉi grava kaj aktuala propono akordiĝas kun la klopodoj pri malpermeso de la kemia armilaro mondscale. Kune kun la lanĉita en 1981 iniciato pri kreo

en la regiono de zono libera de nuklea armilaro, ĝi estas laŭvica esprimo de la aktiva porpaca politiko, efektiviĝata de nia lando sur la Balkana Duoninsulo, en Eŭropo kaj en la mondo.

La Parlamento de PR Bulgario alvokas al la parlamentoj de la balkanaj landoj subteni la proponojn pri kreo sur la Balkana Duoninsulo de zono libera de nuklea kaj kemia armilaro kaj aktive helpi por ilia praktika realigo.

La Parlamento kun kontenteco notas la ampleksan kaj enhavoriĉan programon akceptitan kaj efektiviĝatan en nia lando lige kun la Internacia Jaro de la Paco.

La Parlamento kaj la tuta bulgara popolo esprimas la esperon, ke dum la Internacia Jaro de la Paco la registaroj kaj la parlamentoj, la tuta progresema kaj pacama homaro faros maksimumajn klopodojn por konservi kaj stabiligi de la paco kaj sekureco, por certigo de paca estonto al la homaro. Ĝi unuanime deklaras, ke Popola Respubliko Bulgario kontribuos aktive por transformo de la Internacia Jaro de la Paco en jaron de signifaj pozitivaj ŝanĝoj favore al la paco, sekureco kaj malarmado, por efektiviĝo de la noblaj celoj de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

IMITINDA EKZEMPLO

La Esperanto-societo „Ĥristo Kozlev“ en urbo Polski Trâmbeŝ — distrikto de Veliko Târnovo, kun sia iniciatema kaj senlaca prezidanto Ĥristo Manolov, membro de CE de BEA kaj de la Internacia Komitato de MEM, estas konata en nia lando kaj eksterlande per siaj vigla agado kaj vastaj internaciaj kontaktoj. La societo modele kunlaboras kun la organizaĵoj de la Patrolanda Fronto, kun la Komunuma Pacdefenda Komitato kaj kun la ceteraj amasaj organizaĵoj en la urbo kaj pro tio ĝia agado estas ĉiam sukcesa kaj efika. Ĝi estas en la unuaj vicoj de la batalo por defendo de la paco kaj por malarmado, uzante Esperanton tiucele. Jen nova kaj tre interesa porpaca iniciato de la societanoj.

Okaze de la Internacia Jaro de la Paco kaj honore al la XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio la societo, kunlabore kun la redakcio de la komunuma gazeto „Podem“ (Supreniro) kaj la Komunuma Pacdefenda Komitato okazigis en la urbo kunvenon de esperantistoj kaj neesperantistoj, en kiu estis efektiviĝita foresta dialogo kun pacbatalantoj el diversaj landoj de la mondo. Estis traletigitaj en hulgaringva traduko interesaj leteroj, kiujn la membroj de Esperanto-societo „Ĥristo Kozlev“ ricevis de siaj eksterlandaj korespondamiko, kiuj esprimas siajn simpatiojn al Bulgario kaj admiron pro ties grandaj atingoj en konstruado de la socialismo. „Jam mi scias pri la pacamo, humaneco, gastamo, sincereco de viaj homoj“ — skribas en sia le-

tero Ambrozius Martens el Hago, Nederlando. Poste 11 el tiuj ĉi leteroj (el Aŭstralio, Anglio, Brazilo, Hispanio, Japanio, Kubo, Nederlando, Portugalio, Svedio kaj Uzbeka SSR) kaj du leteroj de pacbatalantoj el Polski Trâmbeŝ estis publikigitaj sur tuta pago de la distrikta gazeto „Borba“ (Batalo) en u. Veliko Târnovo, en ĝia numero de la 27-a de marto 1986, kune kun enkonduka redakcia artikolo, la emblemo de la Internacia Jaro de la Paco kaj fotoj. La leteroj estas publikigitaj sub trafe elektitaj titoloj, esprimantaj la esencon de ilia enhavo. Jen iuj el la titoloj: „Brakoj, etenditaj por amikeco kaj paco“, „Ni proponas nian amikecon“, „Ni la miloj“, „Bulgario estas lando de la paco kaj progreso“, „Ni vivu kiel bonaj najbaroj“ (letero el Grekio), „Hiroŝimo vokas“, „Rakontu pri Bulgario“ k. a. La materialojn por la pago preparis Ĥristo Manolov kaj Raĉo Iliev.

La iniciato de Esperanto-societo „Ĥristo Kozlev“ pruvas, ke la esperantistoj en Polski Trâmbeŝ utiligas sian internacian korespondadon celdirekte, kiel efikan rimedon en la batalo por defendo de la paco kaj por diskonigo eksterlande de la pacama politiko de PR Bulgario kaj ties pacaj iniciatoj. La Bulgara MEM-Komitato arde rekomendas al ĉiuj Esperanto-societoj sekvi la imitindan ekzemplon de Polski Trâmbeŝ. La distriktaĵaj estraroj de BEA povus kaj devus instigi kaj helpi la organizaĵon de similaj aranĝoj, kiuj estos grava kontribuo al la Internacia Jaro de la Paco.

Dimităr HAĜIEV,
Prezidanto de Bulgara MEM-Komitato

INSPIRITAJ DE LA BOTEV-INTERNACIISMO



Jurnalistoj-esperantistoj dum kunsido en Bjala Slatina.

Foto: Hristo Metev

(Daŭrigo de p. II)

ne plene solvitaj, malgraŭ la granda distanco en la tempo kaj enorma progreso de la scienco kaj tekniko. . .

N. Aleksiev tralegis la pamfleton „Ridinda ploro“, kiun Botev dediĉis al la franca proletaro de 1871, versinta sian sangon por la Pariza Komunumo. En tiu fajra pamfleto reflektiĝas la revolucia kaj socialisma pasio de Botev, kiu senrezerve solidariĝas kun la parizaj komunistoj, montras altan ĵurnalistan majstrecon. La internaciismon de Botev la ĉeestantoj eksentis ankaŭ en la du aliaj rimarkindaj verkoj de tiu pasia publicisto — „La Internacio“ kaj „La kredo de la bulgara komunumo“, kiujn N. Aleksiev ankaŭ citis en sia raporto.

„La ĉefa leciono tamen, kiun povus tiri ni esperantistoj, konatigante kun la internaciismo de Hristo Botev — diris N. Aleksiev, — tute koincidas kun la plej ĉefaj taskoj de nia nuklea epoko, tio estas la tiel nomata „nova pensmaniero“. Ĝi diktas al ĉiuj personoj kun malsamaj politikaj, religiaj, filozofiaj kaj aliaj konceptoj, ke ili ne kontraŭstaru unuj al aliaj per siaj malsamaj starpunktoj pri duarangaj problemoj, sed agu internacie por solvo de gigantaj taskoj rilate la savon de la homaro, de la civilizacio, de la kulturo“.

La raporto de N. Aleksiev vekis viglan intereson ĉe la partoprenantoj, provokis multajn eldirojn kaj replikojn, en kiuj alilandaj kaj bulgaraj ĵurnalistoj substrekis sian konvinkon pri la tuŝitaj en la raporto problemoj.

En sia raporto „La esperantista gazetaro — serve al la mondpaco“, surbaze de la ĉiutaga praktiko de redaktado kaj eldonado de revuo „Bulgara Esperantisto“, ties ĉefredaktoro Donĉo Hitrov atentigis la ĉeestantojn pri la ĉefaj direktoj de la revuo. Li emfazis, ke en la nuna streĉita internacia situacio neniu ĵurnalistoj povas deflankiĝi de la plej akraj kaj tiktaj politikaj problemoj, esti neŭtrala. „Bulgara Esperantisto“ ne estas nur asocia, movada revuo — li diris. — En la centro de nia atento estas ankaŭ la plej gravaj politikaj problemoj kaj eventoj kaj ni reagis el la pozicio de la socialisma internaciismo per taŭgaj materialoj. Tiel ni ankaŭ kontribuas por la politika edukado de niaj legantoj-esperantistoj.“ D. Hitrov dividis profesion sperton pri la redaktado de la revuo, pri la strebo de la redakta kolektivo ĉiam plivariigi kaj riĉigi la enhavon, serĉi novajn kunlaborantojn — ankaŭ alilandajn. Li starigis la problemon pri pli regula kaj pli vasta kunlaborado inter la esperantistaj revuoj el la socialismaj landoj kaj alvokis al nobla profesia konkurado.

D-ro Árpád Máthé, konsiderante ambaŭ raportojn,

esprimis sian firman solidarecon kun la starigitaj de la prelegintoj problemoj kaj detale informis pri la redaktado kaj pri la planoj de revuo „Budapeŝta Informilo“. Li faris utilajn proponojn pri interŝanĝo de paĝoj kun buntaj laŭenhave materialoj, pri helpo por disvastigado de niaj E-revuo, pri kunlaborado al TEJA kaj al nacilingvaj eldonoj. Lia eldiro provokis multajn demandojn kaj proponojn far la ĉeestantoj.

Emocia momento estis la distingo de Ivan Keremidĉiev-Esperov kaj Donĉo Hitrov far Georgi Baberkov, prezidanto de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en Vraca per „Ora honora insigno“ pro ilia kontribuo al la disfloro de la socialisma kulturo kaj disvastigo de Esperanto en la distrikto de Vraca. Tiuj distingoj estas rekono ankaŭ por Bulgara Esperantista Asocio.

Interesa kaj informriĉa estis la renkontigo de la fremdlandaj gastoj kun Krástju Lukanov, sekretario de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio, prezidanto de la Organiza Komitato de Botevtagoj' 86. Kr. Lukanov konigis al la gastoj interesajn informojn pri la socialisma konstruado en la distrikto de Vraca, kiu jam transformiĝas ankaŭ en modernan industrian regionon. Li menciis la Kombinaton por produktado de Azotsterkoj kaj kemiaĵoj, la Atomenergian centralon en Kozloduj kaj aliajn industriajn entreprenojn. La dommastro rakontis ankaŭ pri la riĉa kultura vivo kaj unikaj trovaĵoj el la antikveco, elfositaj en la regiono — la oraj tracaj trezoroj, jam famigitaj en la mondo. Li substrekis, ke la Botevtagoj jam estas multjara tradicio, kies programon multe riĉigas ankaŭ la aranĝoj de la bulgaraj esperantistoj kun internacia partopreno.

NIA „VOJAĜANTA KONFERENCO“

kiel sprite nomis ĝin en sia konkluda parolado Hristo Gorov, translokiĝis la 27-an de majo en urbon Bjala Slatina, laŭ la afabla invito de Komunumaj Popola Konsilantaro kaj Partia Komitato. La partoprenantoj en la konferenco estis bonvenigitaj ĉe la sojlo de la kulturdomo „Nikolaj Hrekov“ de ĵunpioniroj, vestitaj en naciaj kostumoj, laŭ malnovbulgara popola kutimo, per „pano kaj salo“. Bonvenigis la gastojn la popola instruisto kaj merita aganto de la kulturo Ivan Georgiev—vicprezidanto de la Komunuma popola konsilantaro, Ivo Peŝev, direktoro de la kulturdomo kaj Vâlĉo Kamenov, prezidanto de la Komunuma Pacokomitato. Agrabla surprizo por ĉiuj estis la artisme bele aranĝita salono, kiu disponigis favorajn kondiĉojn al la ĵurnalistoj. Sub la prezidado de Donĉo Hitrov la konferenco daŭrigis sian laboron. Barbara Pietrzak rakontis pri siaj problemoj en la redaktado de „Pola Esperantisto“ kaj ĵiel ĵurnalistino en la esperanta redakcio de Pola Radio. Si vekis grandan intereson pri la ĉiutagaj elsendoj en Esperanto, al kiuj ehas jam 100 mil aŭskultantoj el la tuta mondo. „La esperanta redakcio multe kontribuas por diskonigo de la vero pri la situacio en Pollando, objektivite kaj ĝuste informas la aŭskultantojn“ — ŝi diris. — „Kaj ankaŭ multon faras por paca renkontigo de esperantistoj el la tuta mondo dum la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio 1987“. Manfred Arnold faris konkretajn proponojn pri kunlaborado per konvenaj materialoj ne nur al esperantaj revuoj en socialismaj landoj, sed ankaŭ al revuoj „Monato“, „Kontakto“, „El Popola Cino“ k. a. Tio plivastigos la eblecojn por ĉiufankaj kontaktoj de esperantistoj el diversaj landoj komune agi por konservado de la paco. En tiu senco faris eldiron ankaŭ Violin Oljanov kaj Clément Tholet. Al pli regula kaj vigla kunlaborado al TEJA kaj al ĝia organo „Internacia Ĵurnalistoj“ arde alvokis Ivan Keremidĉiev-Esperov, emfazante la eblecojn de tiu ĵurnalista tribuno mondscale. Pri profesiaj problemoj kaj pri la formoj de porpaca agado parolis Draguŝko Petrov, Sterju Kukuŝev, Veselin Rizov, Georgi Mi-

ĥalkov, Dimo Trudoljubov. Krâstju Karucin speciale atentigis pri helpo por kunlaborado inter esperantistoj el la ĝemelaj urboj kaj pri dokumentado de valoraj materialoj. Nikola Nikolov atentigis pri la agado de „Monda Turismo“ kaj ties respegulado sur la paĝoj de la esperantaj eldonoj. Maria Jankova, redaktorino en „Bulgara Esperantisto“, tuŝis la problemojn pri la profesia majstreco kaj pri altiro de junaj esperantistoj kiel korespondantoj. Detale kaj objektive Nikola Aleksiev parolis pri la maniero de verkado de porpacaj materialoj kaj pri la sinteno de ĵurnalistoj el la socialismaj landoj dum kontaktoj kun alilandaj, ofte malafable rilatantaj al nia socialisma sociordo esperantistoj, por ke oni ricevu ĝustan imagon pri nia porpaca agado kaj pri nia vivmaniero.

En sia konkluda parolado Hristo Gorov pritaksis la laboron de ambaŭ konferencoj kiel tre sukcesa kaj esperiga, dankis tutkore al ĉiuj, kiuj aktive ĝin partoprenis, kaj esprimis la opinion, ke similaj renkontigoj de ĵurnalistoj-esperantistoj el diversaj landoj estas ege utilaj por la reciproka interkompreniĝo, amikiĝo kaj porpaca agado. Li rekomendis, ke oni okazigu novan renkontiĝon post du-tri jaroj — eble denove en Bulgario aŭ en alia lando.

Por siaj karaj gastoj la ĝentilaj dommastroj en Bjala Slatina — naska urbo de la fama bulgara revoluciulino-komunistino Cola Dragojčeva, preparis varian programon. Multajn emociojn vekis la vizito en la domo-muzeo de la poeto-komunisto Nikolaj Ĥrelkov,

pri kies vivo kaj krea laboro rakontis rememorojn Nikola Aleksiev — lia iama intima amiko. La nuntempa vivo renkontis la ĵurnalistojn-konferencanojn jam ĉe la sojlo de uzino „Pioner“, en kiu pli ol du mil laboristinoj-kudristinoj produktas modernajn vestaĵojn por infanoj, eksportatajn en pli ol 14 landoj de la mondo. La direktoro Dano Danov en agrabla maniero konigis al la gastoj la sukcesojn de la uzino (unualoke en la landoj) kaj afable respondis al multaj demandoj. Estis vera plezuro spekti la modparadon de la produktaĵoj, kiun prezentis infanoj-manekenoj. Granda surprizo estis la organizita en la salono de la kulturdomo koncerto de la mondfama korda kvarteto „Dimov“.

Survoje al Sofio la gastoj vizitis la domon-muzeon de la bulgara esperantisto-publicisto kaj komunisto Trifon Hristovski, kies aŭtobiografia libro „Mia vivo“ estas tradukita jam en kelkajn lingvojn. Pri la neordinara vivo kaj agado de tiu titano de homa spirito emocie rakontis lia fratoŝto Cvetka kaj la direktoro de la loka lernejo Cvetan Tanev.

Jes, la du esperantaj konferencoj estis plensukcesaj! La ĵurnalistojn-esperantistojn atendas streĉa laboro — antaŭ ĉio vigla porpaca agado. La unua paŝo jam estas farita — firma, kuraĝiga. Ek al laboro, kolegoj!

Vraca — Sofio,
majo, 1986

D. SIMEONOV

„Viva vi estas!...“



La gajninto de la Granda Premio — artgrupo el Miĥajlovgrad.

Al la granda Botev:
„Realigis profetaĵo via —
viva estas vi!“

Elisaveta Bagrjana

Tiu verso, elĉizita sur memorŝtono — metita proksime de montopinto Okolčica en Vraca-Balkano, estas ne nur kora konfeso de la talenta bulgara poetino. Tiuj vortoj ankaŭ estas konfirmo de la Botev'a vivo-kredo:

„Ja, kiu falas por la libero
mortas neniam!...“

Ne mortos Botev ĝis kiam bulgaroj vivos surtere! La ornamita per freŝaj floroj memorŝtono ĉiam memorigas al la novaj bulgaraj generacioj pri la senmorta heroaĵo de la arda revoluciulo kaj genia poeto Hristo

Botev, mortpafita per osmana kuglo sur tiu sankta por ĉiu bulgaro loko.

Antaŭ la memorŝtono kaj la Botev-monumento sur montopinto Okolčica metis ruĝajn rozojn ankaŭ la partoprenantoj kaj gastoj de la ĉi-jara Sesa Internacia Konkurso-Recitalo de Botev'a kaj bulgara revolucia poezio en Esperanto. Kune kun la Internacia Esperanto-konferenco „La internaciismo de Hristo Botev kaj nia nuntempo“ kaj la Konsultigo de redaktoroj de Esperanto-eldonoj el la socialismaj landoj la recitalo estis parto de la organizitaj en la tuta Vraca-distrikto Botev-tagoj '86 de la 25-a de majo ĝis la 3-a de junio 1986. Ili estis dediĉitaj al la 110-a datreveno de la Aprila Ribelo kontraŭ la osmana jugo kaj al la heroaĵo de Hristo Botev kaj lia taĉmento.

La 25-an de majo j.k. en la Distrikta Junulara Domo en Vraca kunvenis la partoprenantoj kaj gastoj en la konkurso-recitalo. Laŭ malnova bulgara tradicio la dommastroj bonvenigis ĉiujn per freŝaj bukedetoj el geranio. Ĉeestis ankaŭ la partoprenantoj — bulgaroj kaj eksterlandanoj, en laĵaliaj Esperanto-iniciatoj enkadre de la Botev-tagoj '86.

En la nomo de la organizantoj — la Junulara Domo, Distrikta Konsilantaro pri Kulturo kaj Distrikta Estraro de BEA — la prezidanto de DE de BEA en Vraca Stojan Pavunčev salutis la ĉeestantojn kaj malfermis la konkurson-recitalon. En la nomo de la ĵurio sukcesan sinprezenton al la partoprenantoj bondeziris Kunĉo Vălev.

Sur la scenejo konkuris 26 unuopuloj kaj 6 artgrupoj. Pri iliaj plenumoj sian opinion esprimis la prezidantino de la ĵurio — la merita aktorino Luna Davidova el la Sofia Junulara Teatro.

— Preskaŭ ĉiuj plenumantoj dum sia preparo strebis korekte parkeri la tekston, turnis pli da atento al la lingvo. Tamen tio tute ne signifas, ke ili ĉiam montris perfektan Esperanto-elparolon. Sed artaj konkursoj ne estas nur recitado aŭ kantado en Esperanto. La partoprenantoj ĉiam ankoraŭ devas pensi pri la arta kaj lingva nivelo de plenumo de la elektitaj verkoj. Dum sia preparo la partoprenantoj serĉu la helpon de profesiaj artistoj kaj reĝisoroj. Tiel la Esperantamatora arto plialtigos sian nivelon kaj proksimiĝos al la novaj tendencoj de la nuntempa arto. Tia-



La gajninto de la Unua premio Zdravka Bogdanova el Plovdiv.

Fotoj: Marin Marinov

maniere plimultigos la partoprenantoj kaj la publiko igos pli postulema. Por ilustru miajn pensojn mi donos ekzemplon. La artgrupon de Miĥajlovgrad, gajnantan la grandan premion de la ĉi-jara Botev' konkurso-re-

citalo, preparis la profesia aktoro Emil Mitropolski. Sufiĉe originale li traktis la senmortan Botev-versaĵon „Haĝi Dimitr“, elmontrante la personajn artkapablojn de ĉiu aparta plenumanto. . .

Posttagmeze en la Distrikta artgalerio „Ivan Funev“ okazis koncerto de la laŭreatoj en la konkurso-recitalo.

Tiu jam tradicia kaj populara Esperanto-arango estis ne nur pruvo pri la forto de nia movado. Ĝi multe kontribuis por la propagando de la Internacia Lingvo enkadre de la kelktagaj Botev-festoj, kiujn partoprenis centoj da plenumantoj, gastoj kaj neesperantista publiko. La konkurso-recitalo ankoraŭfoje donis eblecon al la esperantistoj, kiuj emas reciti kaj kanti antaŭ publiko, sin prezenti kaj montri la belsonecon de la Internacia Lingvo. Ja, bonege sonas en Esperanto la flamaj Botev-versoj! . . Lia verkaro, plena de amo al la sklavigita popolo, de alvokoj por liberiga batalo kaj demokratia disvolvigo de la socio, estas tre proksimaj al ĉiuj progresemaj homoj de nia nuntemo. . . Natura estas la ligo inter la verkaro de Botev kaj tiu de la bulgaraj poetoj, kiuj verkis kun Botev'a flamo dum la sanga kruela batalo kontraŭ la faŝismo kaj nun per sia talento arde alvokas por konservo de la monda paco.

Ni rememoru la versojn de Lev Oŝanin, plenumitaj en Esperanto de la eta deklamantino Desislava Dimitrova el Vraca:

„Estu ĉiam la suno,
estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem! . .“

Maria JANKOVA

LA PREMIITOJ

La 25-an de majo 1986 okazis kunsido de la ĵurio de la VI Internacia konkurso-recitalo pri Boteva- kaj bulgara revolucia poezio en Esperanto.

LA ĴURIO ALJUGIS:

GRANDAN PREMION KAJ TITOLON LAŬREATO
Al la grupo de Esperanto-societo „Septembra Gloro“ — Miĥajlovgrad, kun artgvidanto Emil Mitropolski, pro la spektaklo „Haĝi Dimitro“.

UNUAN PREMION

Al Zdravka Bogdanova el Plovdiv pro „Batalo“ de Hristo Botev.

DUAN PREMION

Al la grupo el lernejo „Ivan Vazov“ — Vraca, kun artgvidantino Margarita Danailova, pro la muzika kompozicio — plenumo.

Al Penka Galeva el Pazarĝik pro „Salmo ludas sur herbejo“ de Hristo Botev.

Al Todor Todorov el Stara Zagora pro kreo kaj plenumo de „110 jarojn senmorteco. . .“

TRIAN PREMION

Al la grupo de 86-a lernejo — Sofio (Vladaja) kun artgvidantino Maria Angelova pro la spektaklo „Li mortos neniam“ kaj pro kantoj.

Al Conka Stojanova el Sofio pro „Elegio“ de Hristo Botev.

Al Konstantin Pavlov el Sofio pro „Mia preĝo“ de Hristo Botev.

Al Petja Sirjanova el Veliko Tŕrnovo pro „Al mia unua amatino“ de Hristo Botev.

PREMION DE CE DE BEA

Al la grupo de la Domo de Esperanto-kulturo — Razgrad, kun artgvidantino Dobrinka Zagorova, pro la spektaklo „Vivas li, vivas“.

Al Nikolina Takova el Ĉepelare pro „Balado pri la sovetata soldato“ de Ilija Velĉev.

PREMION DE LA DISTRIKTA KOMITATO POR DEFENDO DE LA PACO — VRACA

Al la grupo de Esperanto-societo „Amikeco“ — Svoge, kun artgvidantino Lioneta Petrova, pro la spektaklo „Ja kiu falas“.

Al Daniela Denĉeva el Sofio pro „Amo dumviva“ de Hristo Gorov.

Al Hristina Nikolova el Pazarĝik pro „La pendumo de Vasil Levski“ de Hristo Botev.

Al Maria Sandanska el Plovdiv pro „Al mia unua amatino“ de Hristo Botev.

PREMION DE LA DISTRIKTA KOMITATO DE KOMSOMOLO — VRACA

Al Gergana Taraŝoeva el Vraca pro „Hajdutoj“ de Hristo Botev.

PREMION DE LA DISTRIKTA CENTRO „STANDARDO DE LA PACO“ — VRACA

Al Desislava Dimitrova el Vraca pro „Ĉiam estu la suno“ de Lev Oŝanin.

PREMION DE LA DISTRIKTA ESPERANTO-ESTRARO — VRACA

Al Vencislav Georgiev el Vidin pro „Al la frato“ de Hristo Botev.

Al Velina Ĉinĉeva el Jambol pro „Elegio“ de Hristo Botev.

Al Diana Mladenova el Svoge pro „Songo“ de Nikola Vapcarov.

INSTIGAJN PREMIOJN DE ĴURNALO „BULGARA ESPERANTISTO“

Al Dimitrina Atanasova el Varna, Dimo Dimov el Varna, Lilia Ilieva el Miĥajlovgrad, Madlen Tiĥomirova el Vidin, Valentina Dimitrova el Jambol, Dobrinka Corteva el Pazarĝik, Ferda Malinova el Pazarĝik, Svetla Popola el Pazarĝik.

Ĉiuj partoprenantoj ricevas ankaŭ la novan eldonon de „Elektitaj verkoj“ de Hristo Botev kaj diplomojn pri partopreno en la Naciaj kulturaj festoj „Botevtagoj 86“, dediĉitaj al la 110-a datreveno de la heroa pereco de Hristo Botev.

Diplomojn ricevas ankaŭ la eksterlandaj gastoj e GDR, Hungario, Pollando, Belgio kaj Mozambiko

Ĵurio:

Prezidantino: merita aktorino LUNA DAVIDOVA

Membroj: ANGELINA SOTIROVA, KUNĈO VĀLEV,
GEORGI MIĤALKOV, LJUBOMIR TRIFONCOVSKI, KIRIL VELKOV, SNEJINKA ANGELOVA

LA PAROLO DE NIAJ GASTOJ

CLÉMENT THOLET — Ĝenerala Sekretario de MEM, profesia ĵurnalisto (Belgio):

— Mi estas feliĉa, ĉar denove mi revenis en Bulgario. La vivo en mia lando ĉiam pli kaj pli malfaciliĝas — plejparte por la junularo, ĉar ĉe ni estas multaj mallaboruloj. Ni ŝuldas al niaj junaj esperantistoj la eblecon fari arton — organizi similajn recitalojn, vivi tiel trankvile kiel iliaj samaĝuloj kaj samideanoj en via lando. Por tio al ni mankas monrimedoj. Al la bulgara junularo via socio disponigas grandajn eblecojn.

Mi dediĉis mian tutan vivon al la pachatalo kaj mi ne povas eĉ imagi, ke popolo, kiu havas la fortan Botev-poezion, povas esti neniigita. Ĉiu normala homo devas batali kontraŭ la milit-minaco por konservado de la kulturaj homaj atingoj, ĉar ĉiu popolo havas sian kontribuon al la disvolvigo de la monda kulturo.



Por mi estis bona okazo partopreni la Botev-tagojn. Mi eksciis multon pri via lando dum la renkontigoj kun urbaj aŭtoritatoj en Vraca kaj Bjala Slatina, kun esperantistoj kaj gvidantoj el la vizititaj entreprenoj kaj institucioj. Mi denove ĝuis la faman bulgaran gastamon. Mi faros bukedon da artikoloj el miaj novaj impresoj pri Bulgario por konatigi al belgaj legantoj la veron pri via lando.

Miaopinie la konsultigo de redaktoroj de Esperanto-eldonoj multe sukcesis. Ni interŝanĝis spertojn, ideojn kaj ankoraŭfoje ni preparolis nian gravan taskon — efektive batali por konservado de la paco. Mi utiligos la eblecon denove inviti reprezentantojn de ĉiuj MEM-sekcioj partopreni la internacian MEM-konferencon en septembro j.k. en Elmstein (FRG). Mi esperas, ke tiu konsultigo de E-ĵurnalistoj ĝis tradicia. Ni devas kunordigi nian porpacan aktivadon.



D-ro APRAD MATHÉ — ĉefredaktoro de „Budapeŝta Informilo“:

— Dum nia restado en Bulgario ni partoprenis kelkajn interesajn arangojn: Botev-recitalon, konferencon pri la internaciismo de Hr. Botev kaj ĵurnalistan konsultigon. La lasta iniciato estis necesa kaj atendita jam de multaj jaroj. Dum la konsultigo ni pridiskutis la problemon pri la plibonigo de niaj E-eldonoj, interŝanĝis profesionan sperton. Post la konsultigo, mi esperas, ke nia kunlaboro plifortigos kaj tiuj renkontigoj estiĝos tradiciaj.



BARBARA PIETRZAK — ĉefredaktorino de „Pola Esperantisto“ kaj redaktorino en la Esperanto-redakcio ĉe Radio Polonia:

— Post 23 jaroj mi denove gastas en Vraca kaj ĝojas vidi vigan lokan E-movadon. Mi estas surprizita pri la konkurso-recitalo de Botev'a poezio. Ĉe vi la amatoraj recitaloj estas bonega tradicio, kiun ni multe estimas. Eble iuj el la

plenumantoj trovos indan lokon en la kolekto de la Bulgara Esperanto-Teatro.

Dum la Konsultigo de esperantistoj-ĵurnalistoj ni rakontis pri la eldonado de ĉiu aparta E-revuoj kaj ni povis konstati kaj la komunajn problemojn kaj la diferencojn inter la eldonoj, ĉar la kondiĉoj en ĉiu lando estas specifaj. Malgraŭ ke niaj gazetoj havas internacian publikon, ili ĉefe estas dediĉitaj al enlandaj legantoj. Dum la konsultigo ni preparolis la konkretan kunlaboradon, la problemojn pri pacdefendo kaj ties respugulado sur la paĝoj de niaj revuoj. Tiu kolegeca renkontigo devas estiĝi tradicio kaj mi esperas, ke dum la sekvonta ni konstatos la realigon de la starigitaj ĉi-tie taskoj. Mi volas substreki la emocian etoson de nia Konsultigo, influitan de Botev-festoj. La personeco de Botev kaj lia verkaro inspiris nin dum niaj diskutoj.



MANFRED ARNOLD — membro de CE de GDREA, publicisto:

— Mi dankas pro la emociaj momentoj dum nia restado en Vraca. Bedaŭrinde, ĝis nun mi ne sufiĉe konis la verkaron de Botev. Mi multon eksciis pri tiu granda filo de via popolo de la riĉenhava raporto de Nikola Aleksiev kaj de la Botev-versaĵoj, kiujn mi aŭskultis dum la recitalo-konkurso. La spirito de Botev multe influis nian laboron dum la ĵurnalista konsultigo. Ni pligustigis detalojn de nia estonta kunlaborado. La esprimitaj opinioj kaj la faritaj proponoj helpas en nia konkreta profesia laboro.

Intervjuis:
MARIA TODOROVA

Fotoj: Aristina Nikolova

KONSERVITA VALORAĴO

La juna E-societo „D-ro Zamenhof“ en Kotel estas heredanto kaj daŭriganto de riĉaj tradicioj. La esperantista movado en la urbo havas interesan kaj longan historion — preskaŭ kiom la lingvo mem. Inter la unuaj kaj plej ardaĵoj adeptoj de la E-movado en nia lando estas la kotelanoj Krástjo Mirski, Svetoslav Manev kaj Krástjo Stanĉev. En 1899 Kr. Mirski eldonas la broŝuron „Koncizaj informoj pri Esperanto“, en kiu li emfazas la avantaĝojn de la nova lingvo. Eminentia sociaganto, literaturisto kaj advokato, urbestro de Varna kaj popoldeputado, Kr. Mirski samtempe estas unu el la fondintoj de Bulgara Esperantista Asocio. Nur unu jaron post la apero de lia broŝuro, alia kotelano, la kuracisthelpanto Svetoslav Ivanov Manev komencas la eldonadon de biblioteko „Espero“, kies unua numero sub titolo „El la esperanta literaturo“ estas eldonita en oktobro 1900 en Sliven. La libreto aperas kvin jarojn antaŭ la unua UK de Esperanto kaj ok jarojn antaŭ la fondiĝo de BEA kaj ĝi estas bibliografia raraĵo. Unu ekzemplero de ĝi estas konservata ĝis nun, kiel valora relikvo, de la filino de Manev — Penka Ĝiceva. La libro entenas 63 paĝojn: antaŭparolo, en kiu la aŭtoro prezentas la celon de la estonta biblioteko „Espero“, konciza historio pri la kreo de la Internacia Lingvo kun klarigoj pri ĝiaj gramatikaj specifajoj kaj 19 amuzaj legaĵoj. Demonstrante per ekzemploj la facilan gramatikon, Sv. Manev sukcesas nur sur kvin paĝoj prezenti ĉiujn gramatikajn regulojn. „Kaj nun,

jam posedante Esperanton, vi povas uzi la literaturon de diversaj popoloj, tradukitan en Esperanton, skribi al viaj gekamaradoj-esperantistoj en la tuta mondo, ekkoni la morojn kaj tradiciojn de iu popolo, kvankam vi ne posedas la lingvon de la lando, kiun vi volus studi“, konkludas Manev. La legaĵoj en la libreto estas variaj kaj interesaj.

En biblioteko „Espero“ Svetoslav Manev emfazas ĉiujn avantaĝojn de la nova lingvo, ĝian vivopovon, bildecon, flekseblecon kaj dementas la atakojn de la skeptikuloj. Li kontribuas aktive por la disvastigo kaj progreso de Esperanto, donante multajn praktikajn konsilojn: kiamaniere efektiviĝi internacian korespondadon — per enskribiĝo en la adresarojn de Zamenhof kaj aldono de poŝtmarko por respondo; pri la eblecoj ricevi la eldonitajn ĝis tiam tri bulgarajn gvidlibrojn por lernado de Esperanto, detala priskribo de la „plej praktika“ el ili — tiu de Oreŝkov kaj Popov, kiel praktike oni povas ĝin havigi alsi, k.a. En la faritaj de Zamenhof laŭ alfabeto ordo adresaroj de gesamideanoj, en serio 20, presita en 1899, ni renkontas la nomon de Svetoslav Manev kaj de aliaj esperantistoj el la regiono de Kotel.

Neniam en la malgranda, sed kun riĉa spirita vivo Kotel, eĉ en la plej malhelaj jaroj de faŝismo, estingiĝis la intereso al la internacia lingvo Esperanto. Tiu intereso estas konservita ankaŭ nun — en la tuteca agado de la E-societo „D-ro Zamenhof“.

Vera TASKOVA

JURNALISTA JARKONFERENCO

La 17-an de aprilo j.k. en Sofio okazis jarkonferenco de la ĵurnalista sekcio ĉe BEA. Partoprenis esperantistoj-ĵurnalistoj kaj aktivaj kunlaborantoj el la tuta lando. La prezidanto de la sekcio Ivan Keremidĉiev-Esperov faris koncizan raporton pri la ĝisnuna agado de la sekcio. Li substrekis, ke pro multaj kaŭzoj la sekcio dum longa tempo — preskaŭ 6 jarojn, — ne okazigis kunvenojn. Tamen la aktivado de esperantistoj-ĵurnalistoj estas vigla kaj ili digne plenumas siajn taskojn por vaste diskonigi al neesperantista publiko la atingojn de Esperanto en Bulgario kaj en la mondo. Li parolis ankaŭ pri la aktivado de la membroj de TEJA kaj pri la kunlaborado inter TEJA kaj Internacia Ligo de Kino-Foto-Magnetofon-Amatoroj (ILEF). Grava estas la fakto, ke la organo de TEJA — „Internacia Ĵurnalistoj“, estas eldonata en Bulgario jam pli ol 20 jarojn kaj ties ĉefredaktoro estas Ivan Esperov. Lastatempe la revuo evidente plibonigis sian aspekton, artan kaj poligrafian kvaliton kaj precipe sian enhavon, al kio multe kontribuas la aktivado de sindonemaj kunlaborantoj.

Dimităr Kalĉev tralegis la projekton pri la estonta agado de la sekcio. Kaj la raporto, kaj la projekto estis vigle diskutitaj flanke de la ĉeestantoj. V. Oljanov, D. Ĥitrov, D. Trudoljubov, Kr. Karucin, Olga Canko-

va, D. Haĝiev, G. Miĥalkov kaj Maria Jankova traktis gravajn problemojn pri la organiza stato de la sekcio, pri la kunlaborado de niaj E-ĵurnalistoj al esperantaj kaj neesperantaj eldonoj en Bulgario kaj eksterlande kaj pri la ĵurnalisma verkado ĝenerale. Ili ĉiuj faris celkonformajn proponojn por plinobigo de la ĵurnalista laboro, por pliviglo de la sekcio aktivado. En siaj paroloj la prezidanto de BEA Ĥristo Gorov kaj la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev tuŝis gravajn problemojn kaj donis konkretajn konsilojn al la estraro por ĝia estonta agado. Grava ĵurnalista atingoj estas la eldonataj de BEA inform-bultenoj: „Esperanto progresas“ (red. G. Miĥalkov), „Asocia Informo“ (red. Rizov), Informa folio „esperantisto“ (red. Sl. Davidov), kiuj estas destinitaj al vasta esperanta kaj neesperantista publiko en nia lando kaj multe kontribuas por la diskonigo de Esperanto en nia socio.

Unuanime la partoprenantoj elektis novan estraron de la ĵurnalista sekcio en konsisto: Ivan Keremidĉiev-Esperov — prezidanto, Nikola Aleksiev — vicprezidanto, Dimităr Kalĉev — sekretario, kaj membroj: Venecij Georgiev (Pleven), Veneta Baleva, Slavĉo Davidov, Evgeni Georgiev. La ĵurnalista sekcio ĉe BEA havas ĉiujn eblecojn kaj nepre devas estiĝi unu el la plej signifaj kaj viglaj asociaj sekcioj! Al la nova sekcia estraro ni bondeziras ĉiufankajn sukcesojn en ĝia nobla laboro!

V. DIMITROVA

Karaj junaj amikoj,

En la redakcio daŭre alvenas viaj leteroj, per kiuj vi esprimas opiniojn kaj proponojn lige kun la ĉeftemo de la pasintjara aŭtuna seminario, organizita de Bulgara Esperanto-Junularo en la Internacia Esperanto-Kursejo — Pisanca. Konekse kun tio ni publikigas fragmentojn el du interesaj leteroj. Ilin skribis junaj E-aktivuloj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la manieroj por aliti kaj membrigo de gejunuloj en la Esperanto-movado. Ĉar tiu problemo estas grava por la disvolvigo de nia junulara movado, la redakcio ankaŭ estonte publikigos similajn leterojn kaj artikolojn.

„BE“

PLI DA ESTIMO KAJ ZORĜO

Ne nur en nia lando ekzistas la problemoj pri varbado kaj membrigo de junaj aktivuloj al E-societoj. Ĝi estas multflanka kaj mi dezirus dividi nur kelkajn miajn konsiderojn pri la instrulaboro kun gejunuloj.

Al ĉiuj estas konata la fakto, ke la societoj strebas malfermi pli da kursoj por komencantoj, taksante ilin kiel rimedo por varbado de novaj esperantistoj. Sed oni subtakas la perfektigajn kursojn. Ili estas esceptoj. Pri bone kaj regule funkciinta perfektiga kurso mi legis nur unufoje — nome pri la parolanta rondo ĉe Sofia Urba Estraro, gvidata de Veneta Baleva. Verŝajne ankaŭ en aliaj lokoj funkcias similaj kursoj, sed informo pri ili mankas.

En tiu ĉi direkto la situacio en nia urbo Pazarĝik ankaŭ ne estas tre bona. Pasintjare ĉe ni ekfunkciis parolanta rondo, sed pro diversaj kialoj ĝi stagnis.

Pro manko de perfektigaj kursoj multaj el la personoj, finintaj elementan E-kurson, ne plu revenas al la movado. Aliaj restas „eterne novaj esperantistoj“. Mi opinias, ke la plej grava kaŭzo estas la nesufiĉo de spertaj kaj sindonaj E-lektoroj. Ĉiu komprenas, ke la rolo de la lektoro ne elĉerpiĝas nur per instruado de la lingvo. La lektoro devas esti vera apostolo de la movado. De li dependas ĉu la kursanoj membriĝos al ĉi tiu la societoj, ĉu ili restos en la movado kaj estigos aktivuloj. La lektoro devas vekti ĉe la kursanoj amon al la lingvo, al la interpopola amikeco kaj paco, informi ilin pri konkretaj atingoj de apartaj esperantistoj en tiu direkto.

De la lektoroj grandparte dependas ĉu la E-movado disvolviĝos aŭ stagnos. Pro tio oni devas atente rilati al la instruistoj. Temas ne nur pri deca monrekompenso — ĝi estas zorgo de la E-societoj. Oni devas prepari E-instruantojn-profesiulojn, kiuj sin dediĉas al tiu agadkampoj. Temas ankaŭ pri morala kuraĝigo kaj estimo al tiuj apostoloj de la movado, kion ni ne ofte konstatas. Ne malmultaj prezidantoj de societoj traktas la E-lektorojn nur kiel plenumantojn de ilia volo, kiel duagradajn agantojn.

Bonan solvon por varbado de E-instruistoj montris la Distrikta Estraro de BEA en Pazarĝik. Al la societanoj finintaj triagradan kurson kun rezulto ne malpli ol „bona“ (4) oni pagas la duonon de la kotizo por la kurso. Al la finintoj de instruarita kurso, post subskribo de kontrakto, per kiu la societano mem sin devigis gvidi kurson tuj post la ricevo de diplomo pri instruarajto, la distrikta estraro pagas centprocente la kotizon por la kurso.

Antaŭ nelonge mi legis pri iniciato de la Sofia Urba Estraro nome-seminario por direktoroj kaj vicedirektoroj de lernejoj, reprezentantoj de la konsilantaroj pri popola klerigo en la ĉefurbo. Dum la seminario en amika etoso la partoprenantoj ricevis riĉajn informojn pri disvolvigo de la E-movado en la tuta mondo kaj en Bulgario. La lernejaraj direktoroj estas tiuj, kiuj devas hel-

pi al ni, sed tre ofte ili tute ne estas informitaj pri Esperanto. Pro tio la faritan paŝon oni devas sekvi.

Ni devas direkti nian atenton ankaŭ al la adoleskantoj. Ni strebu al fondo de E-grupoj ĉe la Kluboj de internacia amikeco en lernejoj kaj junularaj kulturdomoj. Mi povus multon rakonti pri la agado de simila klubo ĉe la elementa lernejo „Georgi Dimitrov“ en Pazarĝik. Ĝi ekzistas ekde februaro 1985, sed jam montris interesan agadon. Al ĝia gvidanto helpas ne nur la Urba kaj Distrikta Estraroj ĉe BEA, sed ankaŭ multaj instruistoj el la lernejo mem kaj la Urba Komitato de la Komsomolo. Dank' al la efika anticipa propagando la infanoj komencis okupiĝi pri la Internacia Lingvo kun ĝojo kaj impeto. Ili interŝanĝis ekspoziciojn de pentraĵoj kun japanaj infanoj. En la Pazarĝik'a Sindikata Domo estis aranĝita ekspozicio de japanaj infanpentraĵoj, kiu vekis grandan intereson ankaŭ ĉe la urbanoj. La samaj klubanoj tre bone sin prezentis en la konkurso-recitalo de Boteva poezio en Vraca. Nun ili korespondas kun slaj samaĝuloj ne nur el Japanio, sed ankaŭ kun tiaj el Pollando, Sovetunio, Hungario ka.

Hristina NIKOLOVA

IMITU NIAN SPERTON!...

Ni, la junaj esperantistoj el societo „Kolombo de la paco“ — urbo Gălăbovo, distrikto de Stara Zagora opinias, ke la plej grava kondiĉo por altiro de gejunuloj al la E-movado estas bone koni iliajn interesojn kaj konforme al ili organizi konvenajn aranĝojn.

Dum la unua kontakto kun neesperantistoj ni rakontas al ili pri la utilo de la Internacia Lingvo kaj pri la agado de BEA, pri la variaj kaj interesa vivo de nia societo. Ni havas kontaktojn kun multaj aliaj landaj kaj eksterlandaj E-societoj. Ni jam organizis renkontiĝojn kun esperantistoj el Dimitrovgrad, Kazanlâk, Stara Zagora, Burgas, Drjanovo, Ruse, Haskovo, Petriĉ, Samokov, Sliven, Varna ka.

En Gălăbovo ni ĉiam okazigas niajn E-aranĝojn ĉe malfermitaj pordoj — por niaj konatuloj kaj parencoj-neesperantistoj.

La laborlokoj de niaj societanoj ankaŭ estas teritorio por propagando de la Internacia Lingvo. Ni ofte montras aŭ donacas al niaj kolegoj ilustritajn E-propagandilojn: faldfoliojn, kalendaraĵojn, afiŝojn, revuojn, flagetojn, glumarkojn, fotojn kaj aliajn esperantaĵojn.

La rezultoj de nia propaganda laboro estas kontentigaj. En „Kolombo de la paco“ membras 80 esperantistoj, el kiuj 66 estas gejunuloj. La societanoj strebas variigi la vivon de la junularo en nia malgranda urbeto. Ni varbas novajn membrojn jam dum la kurso por komencantoj. Ili partoprenas niajn aranĝojn — festadon de naskiĝtagoj, de la Nova Jaro, de 8-a de Marto, de la unua printempa tago, ka. Kiel junaj homoj, ni ŝatas danci, ĝui muzikon — tial en ĉiujn niajn programojn kaj iniciatojn ni inkluzivas distrojn.

Ni strebas efektiviĝi pli vastajn kontaktojn kun junularaj grupoj ĉe diversaj landaj societoj aŭ kun junularaj societoj por interŝanĝi sperton. Nia opinio, unu el la gravaj malperfektaĵoj en la E-agado de junaj aktivuloj estas, ke ili nesufiĉe uzas la klubejojn de la Komsomolo kaj de aliaj amasaj organizaĵoj en la lando. La ligoj kun ili garantias al ni pli bonajn kondiĉojn kaj ĉiufalke helpon por la realigo de niaj iniciatoj.

Fine ni proponas al la estraro de la Junulara Sekcio ĉe BEA pliprofundiĝi siajn kontaktojn kun junularaj eldonoj: „Narodna mladej“, „Mladej“ kaj „Septemvrijec“, porke ili popularigu la landan junularan E-agadon. Kaj al niaj samaĝuloj ni bondezirus imiti nian sperton.

Radi RADEV

NI HELPU AL SPECIALISTOJ!

La 41-a kongreso de BEA difinis Esperanton ne nur kiel rimedon por personaj kontaktoj kaj veturoj eksterlandan, sed ankaŭ kiel rimedon por plialtigo de la profesia kvalifiko.

Nia laboro por propagando de la Internacia Lingvo devas esti direktata ankaŭ al la scienc-teknika kaj arto-krea intelektularo. Por ĝi Esperanto devas transformiĝi en ponton por ricevo de aktualaj sciencaj kaj teknikaj informoj — necesaj por la laboro de la specialistoj. Pro tio en la organizaĵoj okupiĝantaj pri scienca agado kaj en ĉiuj superaj lernejoj oni organizu kursojn de Esperanto. Krom tio estas necese, ke la esperantistoj disvastigu sciencajn eldonaĵojn en la Internacia Lingvo inter neesperantistoj-specialistoj, helpante ilin venki la lingvan baron. Tiurilate oni povas studi la sperton de DE de BEA en Vraca. La lokaj esperantistoj tradukas artikolojn el revuo „Interkomputilo“ kaj disponigas ilin al la Kemia Kombino en la urbo. Rekomence la gvidantaro de la entrepreno finance subtenas la disvolvigon de la E-movado en la urbo kaj la distrikto. Tiamaniere, per la Internacia Lingvo oni havas unu plian eblecon por studado kaj uzado de plej novaj sperto kaj sciencaj atingoj.

Do, mi opinias, ke estus utilaj jenaj proponoj:

- La estraro de Internacia Esperanto-Kurso organizu E-kursojn por specialistoj diversprofesiaj.
- La Somera Universitato en Veliko Tŕrnovo fariĝu tribunon por scienclaboristoj kaj aliaj alte kvalifikitaj specialistoj-esperantistoj.
- Oni instigu sciencistojn-esperantistojn krei scienc-teknikajn terminarojn.
- Oni helpu la realigon de kontaktoj inter bulgaraj kaj eksterlandaj specialistoj por interŝanĝo de informoj pere de Esperanto. Tion oni povus efektiviĝi pere de la Scienc-Informa Centro ĉe BEA. En ĝi estas diversaj Esperantaj eldonaĵoj, de kiuj oni povus traduki materialojn, kiujn oni disvastigu inter la interesgontaj specialistoj kaj organizaĵoj.
- En 1987 en Vraca estu organizita Internacia Scienc-Praktika Konferenco pri temo: „Esperanto kiel ponto por akirado de scienc-teknikaj informoj“.
- Ĉe E-societoj en urboj, kie estas sciencaj institutoj, oni organizu grupojn de sciencaj laboristoj-esperantistoj.

Ljubomir TRIFONČOVSKI

KVINFOJE SUR LA UNUA LOKO!

El la jarraporto por 1985 la delegitoj de la jarkonferenco de Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK), okazinta la 28-an de februaro j. k., ekscii pri la grandaj sukcesoj de la kolektivo de BEK.

La BEK-estraro, ĉe-kape kun la prezidantino inĝ. M. Paskova, la ĉefkontistino L. Draganova kaj la planistino V. Jonĉeva sperte gvidas la agadon de la konciaj kaj iniciatemaĵoj laborkolektivoj. Konstanta kunlaborado kaj interhelpo de la diversaj kolektivoj kaj ĉiutaga kontrolo — jen la ŝlosilo de la bonaj atingoj, nome malaltigo de la produktadelspezoj kaj samtempe alta produktiveco. La neta gajno atingis 114,1%. La sinsekvaj sukcesoj permesis al BEK jam kelkajn jarojn funkcii per propraj monrimedoj, sen bezoni pruntojn de la Bulgara Nacia Banko. Eĉ male — BEK havis la eblecon disponigi al la banko la sumon de 700 000 lv.

Dank' al la bonaj laborrezultoj de BEK, jam kvinan fojon la standardo de la Sofia Urba Kooperativa Unuiĝo estas en la manoj de niaj kooperativanoj. Kvinan fojon BEK okupas la unuan lokon, kaj kelkaj ĝiaj laboristoj ricevis altajn ŝtatajn distingojn!

Zora OŠANSKA

PRI KOREKTA KAJ BELSONA ELPAROLADO

Estas konate al ĉiu sperta instruanto, kiu atentis pri sia pura, esperanta elparolo, ke ofte bulgaraj esperantistoj malbone elparolas la esperantajn vokalojn **a, e, o**, kiam ili estas en neakcentita pozicio. Tio estas karakteriza trajto de la bulgara lingvo, kie ili sonas kiel **i, i, u**. Fakte plej ofte la bulgaroj, parolante sian gepatran lingvon, duonreduktaĵojn vokalojn, t. e. la reduktado ne estas plena: oni ne prononcas anstataŭ **a** **ɤ**, anstataŭ **e** **i**, anstataŭ **o** **u**, sed iun mezan vokalon inter **a** kaj **ɤ** (**ə**), inter **e** kaj **i** (**ei**), inter **o** kaj **u** (**ou**). Tiu ĉi elparolado de la vokaloj **la** (**ə**), **ei** (**ei**), **ou** (**ou**) estas markebla por la orelo de la bulgaro kaj... ofte estas tolerebla en Esperanto-parolo. Sed tamen, se la parolanto plen- reduktas tiujn vokalojn (laŭ sia kutimo de la gepatra lingvo), tio kondukas al malbona, malbelsona elparolo, foje eĉ al miskompreno (ekz. kolero — kulero, trinkos — trinkus, kio — kiu k. a.); tial oni devas eviti ĝin kaj klare prononci la vokalojn.

Kion fari? Sendepende ĉu la instruanto korekte aŭ nekorekte elparolas Esperante, li devas nepre atentigi la lernantojn pri la bona, korekta elparolo. Tiucele li devas pretigi afiŝon kun la vokaloj **a, e, o** (kiuj estu verde kolorigitaj) kaj dekstre de ili estu desegnitaj en ruĝa koloro la respondaj vokaloj **i, i, u**. Tiun afiŝon li pendigu komence de la leciono sur la supra angulo de la tabulo kaj... kiam iu lernanto erare prononcas iun el tiuj ĉi vokaloj, li atentigu lin, montrante al la afiŝo.

Se la instruanto posedas magnetofonon, li mem povas pretigi bendojn kun bona, korekta elparolo kaj demonstri ĝin fojfoje al la lernantoj. Foje li povas eĉ surbendigi la elparolon de apartaj lernantoj por atentigi ilin pri la eraroj. Same povas agi la instruanto, kiu ĉiam ankoraŭ ne havas bonan elparolon. Hejme li povas aŭdi surbendigojn de iu E-teksto en perfekta elparolo. Bona ekzemplo estas la E-instruanto Georgi Dejanov el Sofio, kiu pretigas surbendigon de ĉiuj lecionoj el la uzata nuntempo en la lernejoj lernolibro pere de bonaj E-parolantoj. Lia metodo estas imitinda kaj rezultodona!

Marin BAČEV, ĉefmetodikisto ĉe BEA

AMPLEKSA INSTRULABORO

Ekde la komenco de la kuranta lernojaro E-societo „Flamo“ en Kjustendil montris kuraĝigan agadviglecon. En la klubejo de la societo estas organizitaj E-kursoj: de unua grado — por sep gvidantinoj de junpioniroj (instruanto Bojan Nikolov) kaj de dua grado — por 8 civitanoj kaj lernantoj kun gvidanto Valeri Mitkov. Ĉiuvendrede en la klubejo funkcias unuagrada kurso por 14 civitanoj kaj lernantoj kun gvidantino Adriana Kalojanova. En vilaĝo Jilenci — distrikto de Kjustendil, 14 gelnantoj el la elementa lernejo sub la gvidado de Hristo Kotev konatiĝas kun la Internacia Lingvo. En mezlernejo „Kiril i Metodij“ en Kjustendil 25 komencantoj fakultative faras siajn unuajn paŝojn en la kurso de Maria Labova.

La E-societo en Koĉerinovo ankaŭ organizas E-kurson kun 22 naŭaklasanoj el la loka mezlernejo, kiuj lernas Esperanton sub la gvidado de sia instruisto Rajĉo Krăkov. Li ankaŭ gvidas E-kurson por 16 junpioniroj el aŭka klaso de elementa lernejo „Hristo Botev“.

En Stanke Dimitrov 5 civitanoj lernas Esperanton en la klubejo de Patrolanda fronto en kvartalo „9-a de Septembro“.

La E-societo en Sapareva Banja — distrikto de Kjustendil, ankaŭ organizis E-kurson kun 20 gelnantoj el la oka kaj deka klasoj de la mezlernejo „Hristo Botev“ sub la gvidado de sia instruisto Trendafil Mantarkov.

Svetozar MATEV

VIGLA REFREŝIGO DE ĈINA E-MOVADO

En la Tria Internacia Metodika Seminario „Problemoj de instruado de Esperanto al plenkreskuloj“, okazinta komence de decembro 1985 en Bad Saarow (GDR), partoprenis Marin Bačev, membro de la redakta komitato de „Bulgara Esperantisto“, kiu faris prelegon pri temo „Sugestopedio kaj Esperanto“. La seminarion partoprenis ankaŭ reprezentanto de Ĉina Esperanto-Ligo — Li Shijun, membro de la Akademio de Esperanto, membro de la Konsulta Komisiono pri Edukado de UEA, vicĉefredaktoro de la revuo „El Popola Ĉinio“ kaj vicĉefredaktoro de Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Ĉi-sube ni publikigas la intervjuon de M. Bačev kun Li Shijun.

— Ĉu vi iam estis en Bulgario kaj ĉu vi havas kontaktojn kun bulgaraj esperantistoj?

— Jes, dum la Universala Kongreso en Varna 1978. Ni estis kelkmembra delegacio el Ĉinio kaj tiam ni starigis bonajn kontaktojn kun bulgaraj esperantistoj. Iam, kiam aperadis la gazeto „Internacia Kulturo“, mi korespondis kun Ivan Esperov kaj Asen Grigorov. Tiam mi estis tre juna kaj aktive partoprenis la Esperanto-movadon — mi gvidis kursojn, faris propagandon.

En 1956 aŭ 1957 (mi ne bone rememoras) bulgara delegacio vizitis Pekinon kaj ni kunvenis. Mi mem bonvenigis la delegitojn. Mi bone memoras Atanas Lakov kaj lian edzinon Tinka, Nikola Aleksiev kaj aliajn kamaradojn. Mi trovis, ke ili tute bone komprenas kaj alte taksas la bonajn rilatojn inter la ĉinaj kaj bulgaraj esperantistoj. Legante literaturajn verkojn el via lando, mi ĉiam sentas, ke niaj popoloj estas proksimaj unu al alia, ĉar ili havas tre similajn historiajn sortojn, ĉu ne?

Multaj komunaj aferoj interligas nin, inkluzive la interŝanĝo de spertoj, sciencaj kaj teknikaj scioj. Lige kun tio ankaŭ la kontaktoj per kaj por Esperanto estas utilaj. Mi deziras regule ricevadi vian gazeton „Bulgara Esperantisto“ kaj aliajn viajn E-eldonaĵojn. Mi tre bedaŭras, ke „Nuntempa Bulgario“ ne plu aperas. Mi konis bone ankaŭ la gazetojn „Ripozoj“, „Bulgarino“ k. a.

— Kiamaniere oni refreŝigis la Esperanto-movadon en Ĉinio?

— Dank' al la esperantistoj — MEM-aktiviloj kaj simpatiantoj de Esperanto, en nia lando kreigis pli favora situacio por revivigo de la movado — fondiĝis unuj post aliaj lokaj

grupoj. Ili komencis ne nur aktive propagandi, sed ankaŭ preparis lernolibrojn por elementaj kursoj. Dank' al tiu refreŝigo de la Esperanto-movado en nia lando, mi povis viziti UK de Esperanto en Varna, 1978. En 1979 okazis la Dua Kunveno de Ĉina Esperanto-Ligo, kiu interalie decidis klopodi por eldono de novaj pli ampleksaj vortaroj: ĉina-Esperanto kaj Esperanto-ĉina. Oni ankaŭ komencis verki kaj eldoni lernolibrojn, fondiĝis la organizo „Amikoj de Esperanto“. En ĝi membras cent tridek esperantistoj — ne nur veteranoj de la movado, sed ankaŭ elstaraj personoj el diversaj sferoj: verkistoj, pentristoj, muzikistoj ktp. Ekzemple, eminenta historiisto, kiu verkis famajn librojn kaj lernis Esperanton dum sia junaĝo, ankaŭ membras en tiu organizo. Tial ĝi havas grandan influon al Ĉina-Esperanto-movado.

— Ĉu vi povas precizigi kiom da ĉinoj lernas la Internacian Lingvon?

— Mi ne disponas pri statistikaj donitaĵoj, sed mi povas diri ke, laŭ la venditaj lernolibroj kaj vortaroj dum la lastaj jaroj Esperanton lernis almenaŭ 200 000 ĉinoj. Ĉe ni oni uzas perleteran metodon en la instruado de Esperanto, ĉar nia lando estas tre vasta kaj ne estas ebleco prepari sufiĉe da Esperanto-instruistoj. Tial fondiĝis korespondaj Esperanto-lernejoj. Nur unu el ili sukcesis varbi pli ol 30 000 lernantojn.

Krome, tri-kvar lokaj radiostacioj elsendas regule kurson de Esperanto. Antaŭ nelonge oni organizis televidan kurson en provinco Hanhuj. Almenaŭ 300 000 ĉinoj lernis Esperanton, sed kiom el tiuj, kiuj aliĝis al la kursoj, persistis ĝis la fino mi ne povas precizigi.

— Kion vi bondezirus al la bulgaraj esperantistoj?

— Mi tutkore salutas ĉiujn bulgarajn esperantistojn kaj precipe la esperantistojn-instruistojn, kiuj estas en la avangardo de nia movado. Mi bondeziras al ili pluajn sukcesojn, ili serĉu nova jn efikplenajn instrumentadojn.

Mi esperas, ke dum la Universala Kongreso en Pekino mi renkontiĝos kun bulgaraj esperantistoj.

Intervjuis: Marin BAČEV

leteroj de korespondamiko




Foto: Arkadij Corbaĝijskij

AMATA ŜATOKUPO

Ĉeĥoslovakio, Aŭstralio, Sovetunio, Francio, Pollando, Svedio, GDR, Danlando, Vjetnamio, Hungario, Norvegio, Italio, Hispanio, Alĝerio, Japanio, Kanado, Argentino... De 25 landoj, el ĉiuj kontinentoj flugas leteroj al la bulgara esperantisto Georgi Litov. Liaj korespondantoj — jam 30 — bone konas la paŝon de nia samlandano — kolekti ilustritajn poŝtkartojn, glumarkojn, leterkovertojn k. a. Pri sia hobbio Litov okupiĝas jam preskaŭ 30 jarojn — de 1957, kiam la 22-jara junulo skribis sian unuan leteron al la ĉeĥa esperantistino Sonja Zednikova el Prago. Tiu korespondado daŭras ĝis nun kaj ambaŭ geesperantistoj konas sin kiel gefratoj — jam pli ol tri jardekojn ili dividas perletere siajn ĝojajn kaj tristajn vivmomentojn.

Unu el la unuaj E-amikoj kaj korespondantoj de Georgi Litov estas iama hungara lernantino el Szege — Margaret Nemet. Longan tempon ili interŝanĝas leterojn, sed unuafoje ili renkontiĝis dum la IFEF-kongreso 1984, en Slanĉev Brjag (Bulgario).

LA MONDO EN POŝTMARKOJ

Dum la sama kongreso Georgi Litov akiris novajn amikojn el diversaj landoj, ĉar li transformis la antaŭsalonon de la kongresejo en artgalerion pro la aranĝita de li interesa ekspozicio el bildkartoj, filatelaĵoj, leterkovertoj, jubileaj poŝtmarkoj pri temo „Bulgario — antikva kaj nuntempa“. Multaj el la kongresanoj esprimis deziron konatiĝi persone kun la aŭtoro de la ekspozicio.

Longe kaj emocie Georgi Litov povas rakonti pri siaj korespondantoj. La ricevitaj de li poŝtkartoj jam estas proksimume 5000. Partojn de sia riĉa kolekto Litov montris en dekaj da ekspozicioj, aranĝitaj en diversaj bulgaraj urboj. La plej granda lia ekspozicio „La mondo en poŝtmarkoj“ estis aranĝita en la Sofia Kulturdomo de trafikistoj en 1982.

Per Esperanto Georgi Litov ne nur kolektas diversajn filatelaĵojn, trovas interesajn homojn en la tuta

mondo, sed li ankaŭ gajnas novajn amikojn de Bulgario. En siaj leteroj

LA BULGARO RAKONTAS PRI SIA LANDO,

pri ĝiaj naturbelaĵoj, pri ĝia historio kaj nuntempa socialisma vivo.

Herald Jenkins el Kanado skribas: „Plezuron liveris al mi viaj leteroj, en kiuj vi priskribas la belegan naturon de via lando.“

La japanio Oono Sooiti salutis Litov okaze de la 40-jara jubileo de la Naŭa de Septembro, skribinte: „Mi admiras viajn atingojn sur la vojo al socialismo. Vivu nova Bulgario!“

G. Litov regule sendas al siaj korespondantoj eldonatajn en nia lando Esperanto-revuojn, broŝurojn kaj leterojn. Lige kun la 100-jara datreveno de Georgi Dimitrov li sendis lian eldonitan en Esperanto koncizan biografion kaj la broŝuron, verkitan de Nikola Aleksiev pri Dimitrov kaj Esperanto.

Dankante pro la donacoj, la korespondantoj de Georgi Litov skribis al li:

Familio Marie kaj Sam Eduard el Aŭstralio: „Ni profunde informiĝas pri la vivo kaj batalo de Georgi Dimitrov. Li estas vere elstara batalanto kontraŭ faŝismo. Ni transdonas la unuan libron al biblioteko de Aŭstralia Esperanto-Asocio, la alian — al la biblioteko de loka Esperanto-societo, por ke ankaŭ aliaj konatiĝu kun la biografio de Dimitrov.“

Per la vigla korespondado Georgi Litov interese kaj utile pasigas sian libertempon. Li ĉiam pledas antaŭ gvidantoj de E-societoj subteni la movadon de korespondantoj, ĉar pere de korespondado la homoj, plejparte gejunuloj, plivastigas sian kulturen horizonton, gajnas amikojn de Bulgario. Por la esperantistoj komencantaj korespondi Litov intencas prepari

KONSILARON POR KORESPONDADO

Speciale por la legantoj de „BE“ la sperta esperantisto konfidas kvin el siaj korespond-sekretoj:

Unue — akurateco. Gustatempe respondi al sia korespondanto. Ne lasi sen respondo eĉ unu el liaj demandoj. Kiam la demando estas malfacila por vi, serĉu la helpon de la prezidanto de la E-societo, de la kursorgvidanto aŭ de iu pli sperta samideano.

Due — konvenaj por individua kaj kolektiva korespondado estas, ekzemple, jenaj temoj: la pacama ekstera politiko de Bulgario kun konkretaj ekzemploj; la socialisma vivmaniero en nia lando kaj la politiko de BKP por plibonigo de la vivstato de la laboruloj; la 1300-jara historio de la bulgara ŝtato; kulturaj aranĝoj en Bulgario; vivskizoj de niaj naciaj herooj — V. Levski, Hr. Botev, G. Dimitrov k.a.; la klasika bulgara literaturo; bulgaraj popolokutimoj; naciaj kaj kulturaj festoj; vidindaĵoj, kulturaj kaj arkitekturaj monumentoj, k.a.

Trie — regule noti en siaspecan registrolibron la datojn de la ricevo aŭ sendo de leteroj, koncize mencii pri kio temas, kion vi ricevis aŭ sendis (librojn, broŝurojn, poŝtkartojn, glumarkojn ktp.).

Kvare — ordigi la leterojn alfabeto — laŭ landoj.

Kvine — estu delikata kun viaj korespondantoj, plenumu laŭeble iliajn petojn. Neniam forgesu, ke la korespondado estas respondeca ŝatokupo, kiu gajnas bonajn amikojn ne nur por vi, sed precipe por Bulgario!

La sperto de Georgi Litov povas esti modelo de sociutila agado por ĉiu esperantisto, al kiu estas karaj la ideoj pri amikeco kaj kunlaborado inter la homoj en la mondo.

Maria BOJAĜIEVA



FENESTRO AL LA NUNTEMPA BULGARA LITERATURO

Bulgara nuntempa poezio kaj prozo. Antologio. Kompilinto: Ĥristo Gorov. Eld.: Sofia-Pres, Sofio, 1985. Formato: 70/100/16. p. 230.

Dum la lastaj jaroj en Esperanto aperis kelkaj antologioj, kiuj riĉigis nian tradukan literaturon. Inter ili ni povas mencii „Anglan Antologion“, „Hungaran Antologion“, antologiojn de la kroata poezio kaj prozo kaj aliajn. Nun apud tiuj ampleksaj kaj imponaj antologioj viciĝas ankaŭ la antologio „Bulgara nuntempa poezio kaj prozo“. Eĉ la ekstera aspekto de tiu volumo atestas pri serioza kaj fundamenta verko, kiu prezentas 53 poetojn, 11 prozverkistojn kaj entute 120 verkojn.

Ĥristo Gorov, kompilinto de la antologio, havis la malfacilan kaj ege respondecan taskon plene prezenti la multifacetan nuntempan bulgaran literaturon. Li elektis vere originalan metodon — doni kiel eble pli vastan bildon pri la problemoj, temoj, ideoj, tendencoj en la nuntempa bulgara poezio kaj prozo. La antologio konsistas el tri partoj. La unua — „Revoluciaj poetoj pereintaj en la batalo por libereco“, enhavas la plej belajn poemojn de ĉiuj bulgaraj poetoj, kiuj donis sian vivon por la libero de Bulgario. Inter ili estas la nomoj de Ĥristo Botev, Nikola Vapcarov, Ĥristo Smirnenki, Cvetan Spasov, Atanas Manĉev kaj aliaj. Laŭ mi tiu ĉi parto de la antologio estas plej grava, ĉar per la poemoj de tiuj ĉi poetoj Ĥristo Gorov deziris atentigi la legantojn pri historia fakto, kiun malmultaj eksterlandaj esperantistoj konas — nome ke Bulgario estas la lando de mortigitaj poetoj. Mi ne scias, ĉu en la mondo ekzistas alia lando, en kiu tiom da junaj talentaj poetoj pereis en la bataloj por la libero de sia popolo. Tiu ĉi fakto iĝis la temo de unu el la poemoj de Ljubomir Levĉev — „Lando de l'poetoj mortigitaj“, en kiu la poeto diras:

„... kaj tiel fore el ĉielo
disfloras bela land',
riĉeta —
lando de l'murditaj glorpoetoj.“

En la unua parto de la antologio mi trovis poemojn, kiujn mi tre ŝatas kaj kiuj ĉiam ege emocias min. Eble sufiĉas mencii nur la poemon de Cvetan Spasov „En tia nokto...“, kiu respegulas la revolucion optimisman, tiel karakterita por multaj bulgaraj poetoj, kaj la firman kredon je la feliĉa nova vivo.

„Sin interamos gejunuloj.
Papavoj floras en la bed' ĝardena.
La vivo brilos ĝojplena.“

La dua parto de la antologio havas titolon „Bulgara nuntempa poezio“. Tiu ĉi parto estas la plej ampleksa kaj en ĝi trovas lokon elstaraj nuntempaj bulgaraj poetoj de preskaŭ ĉiuj generacioj. En la komenco estas prezentitaj poemoj de Ĥristo Radevski kaj Mladen Isaev, kiuj verkis aktive antaŭ la liberiĝo de Bulgario elsub la faŝismo. Poste venas verkoj de poetoj de la dua generacio, al kiu apartenas Georgi Gagarov, Penjo Penev, Dimitar Metodiev, poemoj de poetoj de la meza generacio — Vladimir Baŝev kaj Ljubomir Levĉev, kaj la pli junaj Kiril Borisov kaj Vanja Petkova.

La elektitaj poemoj en tiu ĉi parto de la antologio impresas per la riĉeco de temoj, ideoj, problemoj. Tio estas amo al la Patrio, pacbatalo, entuziasma konstruado de la nova vivo, internaciismo, amikeco inter la popoloj, amikeco kun Sovetunio, intimaj motivoj kaj aliaj. En tiu ĉi parto la kompilinto turnis grandan atenton al la bulgaraj poetoj. Mi ne scias, ĉu ekzistas alia antologio, en kiu tiel vaste estas prezentitaj la poetoj de la popolo. Ĉi tie mi trovis la nomojn de preskaŭ ĉiuj bulgaraj poetoj — de Elisaveta Bagjana ĝis Vanja Petkova.

Alia impresa fakto estas la Esperanta temo en la antologio. Ĥristo Gorov elektis poemojn pri esperanta temo aŭ dediĉitajn al herooj-esperantistoj pereintaj en la batalo kontraŭ faŝismo. Tiaj estas la poemo de Orlin Orlinov „Rememoro pri insulo Esperanto“, la poemo de Stefan Poptonev „La gvidisto en la muzeo de Vela Peeva“, dediĉita al la partizanino-esperantistino Vela Peeva, la poemo de Dimitar Stefanov „Balado“, dediĉita al d-ro Vârban Genĉev — kuracisto-esperantisto, heroo pereinta kiel partizano.

La tria parto de la antologio estas „Nova bulgara prozo“. Kvankam ne tre ampleksa, ĝi prezentas la plej bonajn nuntempajn bulgarajn prozverkistojn. Ankaŭ ĉi tie la kompilinto atentis pri Esperanto-temoj en la prozo de la bulgaraj aŭtoroj, kiel ekzemple en la fragmento de Stojan C. Daskalov „Tera lumo“. La temo de la fragmento estas ekskluzive Esperanta.

La antologio valoras ankaŭ el alia vidpunkto — tre grava por la bulgara esperanta tradukarto. Ĝi kolektis la tradukojn de niaj plej bonaj tradukistoj kiel Asen Grigorov, Atanas Lakov, Ĥristo Gorov, Violin Oljanov, Canko Murgin, Ljuba Bojaĝieva, Kunĉo Vălev, Dimitar Haĝiev kaj la pli junaj Lidia Raeva, Venelin Mitev ka.

La poemoj kaj la rakontoj estas tradukitaj ege majstre kaj subtile. Kelkajn poemojn mi tralegis plurfoje kaj mi demandis min, ĉu vere ili estas tradukitaj aŭ eble originale verkitaj en Esperanto. Tiel flue kaj medodie ili sonas en la Lingvo Internacia.

Tamen, recenzante la antologion, oni ne devas preterlasi ankaŭ ĝian antaŭparolon, en kiu Nikola Aleksiev kompetente montras la bezonon de simila antologio kaj faras detalan historian trarigardon pri la jam aperintaj verkoj el la bulgara literaturo en Esperanto.

Rilate la antologion „Bulgara nuntempa poezio kaj prozo“ mi havas nur unu solan rimarkon. Eble estus bone, se pri ĉiuj aŭtoroj estus fotoj kaj koncizaj biografiaj notoj, por ke la eksterlandaj legantoj pli bone orientigu pri ilia vivo kaj kreado.

Konklude mi povas emfazi, ke „Bulgara nuntempa poezio kaj prozo“ malferras larĝan fenestron al nia riĉa literaturo kaj donas eblecon al multaj fremdlandaj esperantistoj pli profunden enrigardi en nian nuntempan poezion kaj prozon.

Georgi MIRALKOV

LA ORA POZIDONO, Julian Modest (pseudonimo de Georgi Miĥalkov). Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. 68 p. 20 cm. ISBN 963 571 132 8. Prezo: 40 ft.

„Jen, post dek jaroj, mi denove estas ĉi tie. Mi denove promenas en tiu ĉi moderna mara restadejo kaj mi provas rememori ĉion, kio okazis en tiu fora somero, kiam mi estis ĉi tie. Mi provas rememori la vizaĝojn de Leo, Klara kaj Adèle. Mi provas rememori iliajn voĉojn, iliajn gestojn... Mi provas ankoraŭfoje restarigi ĉiujn momentojn de tiu ĉi fatala nokto, kiam okazis la festo de Pozidono kaj kiam malaperis Klara.“

Tiel retrospektive kaj atentokapte nia juna verkisto Julian Modest komencas sian originalan novelon „La Ora Pozidono“ (1984) — verko, kiu havas ĉiujn ecojn por okupi dignan lokon en la Esperanta proza verkaro.

Emil Vasev, ĵus fininta gimnazion en montara urbo, ferias unuafoje ĉe la Nigra Maro. En la apudmara ripozejo li konatiĝas kun la juna geedza paro Leo kaj Klara Kanev kaj kun la francino Adèle, leteramikino de Leo. Esperanto estas komuna lingvo de la kvaropo. La impresigema kaj purkora junulo enamiĝas je la ĉarma, preskaŭ samaga Adèle, tamen ĉi-lastata moke respondas liajn korporspirojn. Krome, Emil rimarkas suspektemon ĉe Klara pri la rilatoj de ŝia edzo Leo al Adèle.

Turnopunkto venas, kiam Emil tute hazarde, per la propraj okuloj konstatas la intimecon inter Leo kaj Adèle, kiun li antaŭe nur supozis. Poste li ne plu ŝatas ilian kompanion.

Intertempe la malakordo en la rilatoj inter Klara kaj Leo profundigas.

Dank' al tiu kazo Emil proksimiĝas al Klara. Ili aŭbaŭ seniluziigis en siaj esperoj pri vera kaj sincera amo, pri honesteco en la homaj interrilatoj: Klara, kiu ricevis oficon de scienca kunlaborantino en la Medicina Akademio dank' al sia influa edzo, hospitala vicedirektoro kaj filo de fama profesoro; Emil, kies patro estas simpla bankoficisto en montara urbo... Post la okazinta en la ripozejo Festo de Pozidono, Emil kaj Klara nesentebles iras al la ŝatata golfo de Emil kaj ĉi-nokte Klara mistere malaperas en la maro — eble rabita far la ĉiopova mara reĝo Pozidono...

Kun laŭdinda konsekvenco Julian Modest prezentas en sia esperantlingva kreado la vivon de esperantistoj (dramo „Ni vivos“, romano „Maja pluvo“). En lia novelo „La Ora Pozidono“ superregas la lirikeco kiel ĉeftrajto de la rakontmaniero. En sukcese aranĝitaj epizodoj kaj per ĝuste elektitaj bildecaj vortoj kaj esprimoj li funde esploras la psikologion kaj majstre rivelas la sentojn de siaj roluloj, ĉarme priskribas la marbordajn naturbelaĵojn. La aŭtoro vivece traktas la problemon pri pureco en la interhomaj rilatoj kaj pri supertaksado de homaj valoroj („Ĉu nia tuta vivo ne estas serĉado de iu fikcia „Ora Pozidono?“), pri la veraj kaj falsaj homaj idealoj. La verkista starpunkto pri la sociaj problemoj kongruas kun tiu de la juna rakontanto Emil, troviganta en la komenco de sia vivo vojo kaj serĉanta la veron pri la homaj vivo kaj feliĉo. La legendo pri la Ora Pozidono simbolas karakteran homan traŭton — la ĉiaman serĝadon...

La novelo „La Ora Pozidono“ estas verkita en klara kaj bildeca stilo. Bonkvalite presita, ĝi estas rekomendinda legaĵo por la bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj.

Evgeni GEORGIEV

La 19-an de aprilo j. k. en Vraca okazis scienca seminario, dediĉita al la 25-jariĝo de la unua flugo de homo en la kosmo. La aranĝon, organizitan de DE de BEA en Vraca, kune kun la Sofia Astronaŭtika Societo, partoprenis 25 personoj — precipe el Vraca. La konferenco malfermis la vicprezidanto de DE de BEA Kiril Velkov. En la nomo de CE de BEA la ĉeestantojn salutis Kalinka Vasileva. La supera scienca kunlaboranto kaj kandidato de filozofiaj sciencoj Cvetan Kardaŝev interese prelegis pri temo „Jurij Gagarin — homo fantasta, aŭ homo de la estonto“. Kalinka Baeva, supera scienca kunlaboranto kaj kandidato de teknikaj sciencoj, parolis pri la kosmologiigo kaj ekologia estonteco de la homaro. Jaroslav Matviŝin, supera scienca kunlaboranto kaj kandidato de fiziko-matematikaj sciencoj en Ukrainia Akademio de Sciencoj, konatigis la ĉeestantojn kun la ukraina sciencisto Jurij Kondratjuk kaj liaj verkoj pri raketeĥniko kaj teorio de la kosmaj flugoj. Prelegis ankaŭ Elenko Todorov — pri „Ekologizado de la elektroproduktado en la kosmo“; Kiril Velkov, kandidato de teknikaj sciencoj — pri la perspektivoj de pilotataj kosmaj flugoj; Ljubomir Trifonovski — „La unuaj bulgaraj versajoj pri Gagarin“; Rumjana Naĉeva — „Simetrio kaj kosmologio“ kaj ing. Atanas Georgiev — „Problemoj de la kontaktoj“.

La seminario estis bonege organizita kaj la partoprenantoj parolis nur en Esperanto. Tiu aranĝo vekis grandan intereson kaj ni esperas, ke la nova iniciato de la agema DE de BEA en Vraca estos komenco de multaj tiuspecaj seminarioj.

Ĉiuj interesigantoj pri astronaŭtiko sin turnu al Kiril Velkov el Vraca — P.K. 66.

K. ATANASOVA

JAM TRADICIA FESTO

Jam depost kelkaj jaroj la membroj de E-societo „Solidareco“ — Bankja, organizas en montodomo „Ljulin“, kune kun la esperantistoj el urbo Pernik, feston dediĉitan al la unua printempa tago — la 22-a de marto.

Ĉi-jare la aranĝon partoprenis ankaŭ membroj de la turista societo „Murgas“ kaj turistoj el la entrepreno „Maŝtroj“ — urbo Trojan. La artprogramo, plenumita en Esperanto kaj bulgarlingve, konigis al la neesperantistoj multon pri la Internacia Lingvo. En la programo sin prezentis Angelina Sotirova — aktorino el Bulgara Esperanto-Teatro, gitara ensemblo kun gvidanto Dimitar Markov, ka.

Tiu ĉi iniciato ankoraŭfoje pruvis, ke la komunaj ekskursoj — de esperantistoj kaj neesperantistoj, estas bona maniero por propagandado kaj varbado de novaj adeptoj de Esperanto.

Boris ATANASOV

PLEVEN GASTIGIS INSTRUISTOJN

Dum la printempaj lernejanaj ferioj, de la 31-a de marto ĝis la 8-a de aprilo j. k. CE de BEA kaj DE de BEA en Pleven por dua fojo organizis tutlandajn intensajn kursojn por preparo de mezlernejaj instruistoj de Esperanto.

Rektoro de la kursoj, en kiuj oni inkluzivis ĉiujn lingvajn gradojn, estis d-rino Emilia Kanjovska — prezidantino de la urba E-societo „Eterna Amikeco“. Kiel lektoroj estis invitatitaj spertaj esperantistoj el Veliko Târnovo kaj Ĥaskovo.

La bonaj labor- kaj vivkondiĉoj garantiis la sukceson de la kursoj.

Jorjeta KAMENOPOLSKA

Karaj legantoj,

En n-ro 6/1986 de „Bulgara Esperantisto“ ni publikigis liston de la premiitaj verkoj en la Konkurso pri originala kaj traduka Esperanto-prozo „Stranga Sakar“—Respubliko de la juneco '86“, okazinta en Jambol, en aprilo j. k.

Nun vi havas la eblecon konatigi kun la premiitaj miniaturaj „Nova legendo“ (dua premio, „Kia estus?“ kaj „Kio estus“ (tria premio).

NOVA LEGENDO

Arbaroj malsupreniras al la maro! Nudaj, forlasitaj terenoj ricevas novan veston! Terenoj eroziitaj, sen ia ajn espero, ke iu arbusto aŭ alia kreskaĵo povus reteni siajn radikojn, venki kaj akiri por si parteton de la tero!

Dezertaj deklivoj! Nenia ebleco por la birdoj trovi branĉojn, de kie elverŝi siajn tintosojn kantojn! . . .

Bela kaj unika monto! Monto, ĉirkaŭata per vastaj kverkaj kaj fagaj arbaroj! Eterne verdaj arbetoj, florantaj en majo per grandaj blu-siring-koloraj floroj!

Bela estas la monto, sed forlasita kaj nepri-zorgata. Naturaj paŝtejoj sen paŝtaĵo, sen ŝafaroj! Ne plu estas aŭdeblaj la kantoj de la paŝtistoj, la sonoj de la paŝtistaj flutoj! . . .

Sekaj ravinoj, malhelaj kaj misteraj! . . . Kvietaj montaltajoj, senmovaj kiel morte senvivaj marondoj! . . . Herbaĉkovritaj agrokampoj, ŝtonplenaj valoj, terenoj senigitaj je zorgoj, je laborema homa mano! Riveretoj sen guto da akvo! Akvo eltrinkita de la arda suno! . . .

Jaron post jaro la akvaj fortegoj forprenas la teron. Fortaj ventoj furiozas en la montaraj valoj kaj detruas la skulptitajn formojn. Restas nur la malnova gloro de la netravageblaj arbaroj, kaŝintaj dum jarcentoj hajduojn kaj vojevodojn.

Pasadas la jaroj! . . . Strangaj legendoj rakontas pri la magia forto de Stranga-monto kun deklivoj kaj faldoj en verda, griza kaj blueta koloro! . . .

Kaj naskiĝas nova legendo! Legendo tute reala, perceptebla. Legendo pri la nova homo, veninta en tiuj lokoj pro la premo de unu nova leĝo, de unu senduba ordono, ekĝerminta el la profundaĵoj de la homa koro kaj entenanta en si la soifon de la tero pri akvo, la senonigitajn trilojn de la kantbirdoj, la aromon de la flortufaj herbejoj, la susuron de la folioj en la densaj iam arbaroj kaj arbustejoj, la freŝecon de trankvilaj arbaraj vojoj . . .

Laŭ la potenca volo de tiu ordono la homo — amiko de la naturo, venas per la konstanta, neforigebla kuraĝo esti ĝia kreanto kaj defendanto. Li venas kun la sama espero kaj kredo, kun kiuj la fajrodancistinoj, tiuj nimfoj de iu el la plej belaj bulgaraj kutimoj, eniras en la fajron kaj dancas nudpiede sur la ardanta karbaĵo. . .

Venas la homo! Ĉesas la vento! La torentoj haltigas sian kuradon malsupren! Kontraŭ ili estas la homo, la fortaj homaj manoj, ŝultroj.

Ho, Homo! Ne haltu! Nun vi estas la mastro Nun via forto estas vera potenco! Ne reiru! Bridu, obeigu la naturajn fortojn! Ili devas esti viaj subigemaj servantoj!

Estu denove plenigitaj la riveroj per pura akvo! Estu venantaj denove la forpelitaj kantbirdoj!

Eksonu en la arbaroj kanto por laŭdo kaj gloro de via laboro, de via potenco!

Lilia KOLEVA, Sofio

KIA ESTUS?

Kia estus mondo sen progreso?

La estonto sen hela promeso?

Kia estus l'hom' sen idealo?

— nia ter' sen esperantistaro?

KIO ESTUS?

Kio estus agloj sen montaj rokaroj?

La kantemaj birdoj sen verdaj arbaroj?

La ĉielo alta sen ĝia blueco?

La homaj rilatoj sen pur-amikeco?

Atanas KOSTADINOV, Plovdiv

BATAK

Venigas nin ĉi tien mirinda via gloro,
de ĉiuj randoj el patri' libera,
pro via epopeo ekbatas nia koro,
sekigas nia gorgo, kaj ĉesas nia spiro.

Ĉi tie la herooj vivas per inda morto,
kortuŝas nin la vestoj de kugloj disŝiritaj
kaj superfluas nune la homaj vortoj
ĉe l'ŝtonoj en preĝejo per sang'sprucitaj.

En vi bulgara sango sin verŝis en torento
kaj ĝi morte vundis sovaĝan beston.
„Libero aŭ morto“ sonoras en silento
kaj brilas la aŭreolo de l'aprila festo.

Eterna via glor' nin dissendas goĵaj,
al ĉiuj randoj de l'patri' fiera
vi por miljaroj testamentis vojon —
„Batalu por la vivo, batalu por libero!“

Penjo STOJANOV, Haskovo

EN SOFIA ESPERANTISTA KULTURDOMO

La periodo de la 15-a de aprilo ĝis la 15-a de majo j. k. estis riĉa je signifaj enlandaj kaj internaciaj eventoj, kiujn la Sofia Esperanto-Domo pri Kulturo (SEDK) „M. Gorkij“ plensukcese respegulis.

En la Sesio de Monda Packonsilio en Sofio (24-27. 04. 1986) oficialaj delegitoj estis d-ro Imre Pethés — prezidanto de MEM kaj Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM. La 23-an de aprilo en SEDK estis organizita Vespero de Paco. En sia prelego d-ro Pethés priskribis la rolon de esperantistoj en la pacbatalo. Du informojn pri la Internacia Packonferenco en Volgogrado (7-13. 04. 1986) faris la sekretariino de MEM Vasja Cvetkova kaj pri la laboro de la Monda Packonsilio — N. Aleksiev. Belarta programo, plenumita de infanoj el 152-a Infangardeno en Sofio kaj de junuloj-esperantistoj, kontribuis al la agrablata etoso de la kunveno. V. Cvetkova kortuŝe rakontis pri japana virino el Hiroŝimo, travivinta la atombombadon.



De dekstre maldekstren: Nikola Aleksiev, d-ro Imre Pethés, Violin Oljanov

La datreveno de la venko super faŝismo estis celebrata kunlabore kun la Distrikta Estraro de BEA — Sofio, kies prezidanto Ivan Culev prelegis pri la grava historia antifaŝista batalo kaj raportis pri la E-agado en la distrikto de Sofio. La programo inkluzivis recitaĵojn kaj kantojn, folklorajn dancojn. Ilin plenumis laŭreatoj de la 19-a Revuo de Esperanto-Parolo kaj Kanto '86 el la urboj Botevgrad, Ihtiman kaj Svoge.

Estigis jam tradicio la organizataj en SEDK renkontigoj de la redakta komitato de revuo „Bulgara Esperantisto“ kun ties legantoj. La ĉi-jara renkontiĝo, okazinta la 16-an de aprilo, elvokis apartan intereson. Post la enkonduka parolado de la ĉefredaktoro de la revuo Dončo Hitrov, okazis vigla diskutado. La opinioj, demandoj kaj rekomendoj temis pri: respegulo de signifaj enlandaj kaj internaciaj eventoj — neesperantaj kaj Esperantaj; certigo de pli da spaco en ĉiu numero por la problemoj de junaj esperantistoj; regula informado pri E-gazetaro; artikoloj pri lingvaj temoj kaj novaj E-libroj; anguleto de amuzoj. Oni substrekkis plibonigon de la revuo, precipe ekde la komenco de la kuranta jaro. La persista laboro de la tuta redakta komitato ricevis bonan pritakson de la legantoj.

Plenumante unu el siaj taskoj — variigi la agadon de SEDK, ties estraro realigis ankoraŭ unu interesan arangan — prezenton de novaj E-libroj, eldonitaj en Bulgario kaj UEA. Pri ili informis la respondeca redaktoro de la eldonejo de BEA Georgi Miĥalkov.

Nedka VALJAVIČARSKA

GRANDA FAKA BIBLIOGRAFIO

Verŝajne la plej granda kaj kompleta jara bibliografio de verkoj pri la lingvo kaj literaturo de Esperanto estas tiu, kiu aperas en MLA (Modern Language Association of America), nome „International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures“. Ĝus aperis tiu giganta kompilaĵo por la jaro 1984. En kvin volumoj, la verko enlistigas iom pli ol 43 000 sciencajn artikolojn kaj librojn, kiuj aperis dum la jaro, en la jenaj fakoj: (1) Literaturoj de la Brita Insularo, Brita Komunumo, Angla Karibio kaj Usono; (2) Eŭropa, Azia, Afrika kaj Sudamerika Literaturoj; (3) Lingvistiko; (4) Ĝenerala Literaturo; (5) Folkloro.

La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo, en sekcio nomita „Helpaj lingvoj, internaciaj lingvoj“. Tiu ĉi sekcio estas tamen nur parto de la tuto. Dise tra la volumaro, precipe en la dua kaj kvara volumoj, aperas pliaj eroj Esperantaj. Ili estas troveblaj per ampleksega indekso de 2992 kolumnoj sur 1496 paĝoj, kiu sendas la uzantojn al Esperantaj verkoj en aliaj partoj de la bibliografio. Ĉio kune donas bonan superrigardon de la laboro de niaj esperantologoj dum la koncerna jaro.

Por ĉiu ero aperas bazaj bibliografiaj informoj (titolo, loko de apero, eldonejo, paĝonombro — por volumoj; titolo de la periodaĵo, volumo, numero, paĝoj — por artikoloj). Tiujn informojn generas komputila sistemo, kiu konservas ne nur tiujn bazajn informojn, sed ankaŭ amason de aliaj detaloj pri la koncerna verko.

La giganta laboro de kompilado estas farata de teamo de 160 personoj, plejparte usonaj universitataj fakuloj. Respondecaj pri la fako „Kunmetitaj kaj derivataj lingvoj kaj ilia komunika konduto“ estas d-ro Humphrey Tonkin kaj d-rino Jane Edwards, el Stata Universitato de Novjorko, kaj nederlanda kunlaboranto d-ro W. A. Verloren van Themaat. D-ro Tonkin regule vizitadas la Bibliotekon Hodler de Universala Esperanto-Asocio, en Rotterdam, por fari la kompilan laboron. Aliaj eroj estas kolektataj aliloke, kaj ankaŭ aliaj teamanoj aŭ funkciuloj de MLA aldonas erojn trovitajn en aliaj laborterenoj.

La bibliografio de MLA havas longan historion. Inter specialistoj pri anglalingva literaturo ĝi estas nepre la plej prestiĝa kaj konata (kaj kompleta) kompilaĵo. Ĝi ankaŭ ĝuas bonan reputacion inter fakuloj pri aliaj eŭropaj literaturoj kaj inter specialistoj pri lingvistiko. Malgraŭ la longa historio, nur per la volumo de 1979 komenciĝis la kunlaboro da esperantistoj. En tiu jaro d-ro Verloren van Themaat aliĝis al la kompilantaro, kaj la nombro de eroj en la sekcio „Internaciaj lingvoj“ kreskis de 5 en 1978 al 120 en 1979. En 1980 Humphrey Tonkin aliĝis. Okazis salto al 233 eroj. En 1981 enkondukiĝis la nuna komputila sistemo por la bibliografio, kaj depost tiam la koncerna sekcio montras la jenan profilon: 1981 — 278 eroj; 1982 — 253 eroj; 1983 — 241 eroj; 1984 — 286 eroj. Eroj ellasitaj en difinita jaro estas aldoneblaj en postaj jaroj.

Estas kompreneble tre grave, ke esperantologoj kaj aliaj fakuloj ja konsultu la bibliografion, kaj ankaŭ atentigu la kompilantojn pri mankantaj eroj. La potencialo de la bibliografio estas grandega — interalie pro tio, ke ĝi estas nun komputile alirebla kaj sekve traserĉebla — kaj ni estas bonŝancaj, ke MLA pretas dediĉi tiel detalan atenton al nia fako (pli detalan ol ĉe kelkaj aliaj fakoj). Tamen, ne temas pri tio, ke MLA faras komplezon al Esperanto, sed ke esperantologio kaj la lingvo Esperanto estas akceptataj samrange kiel aliaj fakoj kaj lingvoj.

H. T.
(El cirkulerletero de UEA-Informservo,
1.01.1986)

E-GVIDADO TRA LA HÄNDEL-MUZEJO

La fama komponisto Georg Friedrich Händel naskiĝis en la urbo Halle en 1685. Okaze de la 300-jariĝo de la granda komponisto lia naskiĝdomo estis rekonstruita kaj plilarĝigita. Samtempe ankaŭ plialtigis la nivelo de la teknika (precipe akustika) ekipaĵo. En la Händel-domo ekzistas magnetofona gvidado en pluraj lingvoj, kaj ekde februaro ĉi-jara — ankaŭ en Esperanto. Ĝi daŭras ĉirkaŭ 45 minutojn kaj enhavas klarigojn pri la vivo kaj kreado de Händel kun multaj muzikaj ekzemploj.

Esperantistaj grupoj venantaj en Halle nepre profitu la eblecon ekkoni kaj ekami la muzikon de Händel. Konsilinda estas antaŭmendo de la gvidado: DDR-4020 Halle, Geiststrasse 32, PSF 161, tel. 2 80 02 kaj 2 80 03.

Hans-Peter BARTOS,
prezidanto de DE de GDREA en
Halle

EKSPONIZIO-KONKURSO

La Esperanto-klubo en siberia urbo Krasnojarsk organizas internacian ekspozicion-konkurson de infanpentraĵoj pri temo: „Infanoj de la mondo vivu en paco!“

La organizantoj reciproke sendos pentraĵojn de sovetiaj infanoj, bildkartojn pri Krasnojarsk, esperantaĵojn. Al plej bonaj pentraĵoj oni donos premion. Sur la dorsa flanko de la pentraĵoj, post la titolo, skribu nomon kaj familian nomon de la aŭtoroj, aĝon, landon kaj gustan adreson.

La organizantoj atendas aktivan kontribuon el multaj E-kluboj, organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj. Infanpentraĵoj servu al amikeco kaj paco en la mondo!

Krasnojarska Esperanto-Klubo:
USSR, 660075, Krasnojarsk
p. k. 2420

AL VIZITANTOJ DE VILNIUS

Se vi intencas vojaĝi al litova ĉefurbo Vilnius, nepre kontaktu kun junulara E-klubo „Juneco“. Junecanoj ĉiam volonte promenis Vin tra la urbo kaj konatigos kun litova E-movado.

Kontaktu per telefono la prezidanton Sigita Zilionis (ofica 73 30 75), vicprezidantino Dalia Bičiūnaitė (ofica 75 40 09, hejma 42 10 65) aŭ anticipe

skribu al E-klubo „Juneco“, P. O. Box 61, 232000 Vilnius-C, Litovio. Bonvenon en la litova ĉefurbo!

„Juneco“

SAKTURNIRO EN SLOVAKIO

La ŝaka Sekcio de SEA kunlabore kun E-klubo ĉe la Domo de Kulturo en Žilina invitas vin al la VI ŝakturniro por la premio „Migranta Pokalo“ de SEA, kiu okazos la 13-an-14-an de septembro j. k. en la Domo de Kulturo en Žilina. La ŝakturniron povas partopreni anoj de SEA, CEA kaj eksterlandanoj parolantaj Esperante. Partoprenontoj estos envicigitaj en du kategorioj: registritaj kaj neregistritaj ŝakludantoj. La „Migrantan Pokalon“ povas akiri nur ano de SEA.

Informojn pri la ŝakturniro petu ĉe s-ano Salát Miroslav, 023 35 Ochodnica 126, CSSR.

ARKONES '86

Studenta Esperanto-Klubo kaj Kultura Esperanto-Centro en Poznań (Pollando) organizas Kvinajn Artajn Konfrontojn en Esperanto (Arkones), kiuj okazos 10-12.X.1986. Temo de la ĉi-jara arango estas: „Ĉu la Esperanto-kulturo travivas krizon?“. La organizaĵoj atendas aktivan kontribuon al la seminario, dum kiu vi povos montri vian koncepton pri la nuntempa Esperanto-kulturo. Oni ĝoje akceptos volontulojn, kiuj decidus partopreni teoriajn kaj kanzonajn konfrontadojn.

Bulgaraj gejunuloj, dezirantaj viziti la arangon, povas aliĝi pere de Bulgara Esperanto-Junularo: Bulgario, 1303 Sofio, bul. „Aristo Botev“ 97.

VESPERO DEDIĈITA AL GEMELURBO

La membroj de Esperanto-societo „Penka Miĥajlova“ — en dua subdistrikto de la ĉefurbo, jam delonge havas amikajn ligojn kun la esperantistoj el brita urbo Edinburgo, ĝemeliginta kun Sofio. La 25-an de aprilo 1986 la societanoj organizis vesperon, dediĉitan al la ĝemela urbo. Liljana Dokova tralegis artikolojn pri Edinburgo, ĉerpitajn el malnovaj jarkolektoj de „The British Esperantist“. La arango vekis grandan intereson.

La ĉeestintoj sendis leteron kaj esperantan libron pri Sofio al la Edinburgaj esperantistoj. Tiamaniere la societanoj modeste notis la Internacian tagon de la ĝemeligitaj urboj — la 27-a de aprilo.

St. SOKOLOV

La legantoj proponas

NI ANKAŬ BEZONAS ADRESAROJN

Ordinare organizaĵoj de samfakuloj en multaj landoj regule aperigas adresarojn de siaj membroj. Tion faras precipe organizaĵoj de verkistoj, ĵurnalistoj, kuracistoj, arkitektoj, inĝenieroj k. a. En la adresaroj ofte estas, krom la nomo kaj adreso, ankaŭ pluraj utilaj informoj. Tiuj eldonaĵoj tre helpas la kontaktojn inter samfakuloj, sed ankaŭ estas utiligataj de personoj, kiuj serĉas pro diversaj kialoj fakulojn.

En iuj landoj ankaŭ Esperanto-organizaĵoj eldonas adresarojn, sed ili donas informon plej ofte nur pri la Esperanto-aktiveco de la priskribitaj personoj.

Mi opinias, ke estus tre utile, se la Esperanto-organizaĵoj periode eldonus detalajn adresarojn pri siaj membroj, se ili estas pli ol cent. Se tio okazus, la kontakto inter la gesamideanoj en tiuj urboj estos multe pli viglaj kaj intensaj. Kaj nepre tio bone influos la agadon por kaj per Esperanto.

En Sofio estas ĉirkaŭ 1 500 geesperantistoj, kiuj membras en 21 societoj. Ne ĉiuj estas konataj en la deko da Esperanto-oficejoj de la ĉefurbo. Ne malofte oni demandas pri adreso de iu esperantisto, kiu estas serĉata de alia loka esperantisto aŭ de samideano veninta el alilando. Iam oni povas helpi, sed ne pri ĉiuj organizitaj esperantistoj. Imagu, ke ĉiu samideano en Sofio havas tre detalan kaj aktualan adresaron de ĉiuj urbaj esperantistoj. Kiom utila ĝi estus!

N. N.

Jam kelkajn monatojn en urbo Pravec, distrikto de Sofio, funkcias nova E-societo „Standardo de la paco“. La solenan inaŭguron ĉeestis Ivan Culev — prezidanto de DE de BEA kaj ĝia sekretario Radoslav Paraŝkeov, Stamenka Bojkova — sekretario de societo „Trifon Hristovski“ en Botevgrad. La gastoj salutis la fondintojn de la nova societo kaj bondeziris al ili fruktednan laboron.

En la nomo de la societanoj la prezidantino Cvetanka Lilova esprimas pretecon por sindona agado, intensa disvastigo de la humanaj esperantistaj ideoj kaj realigo de la noblaj celoj de la movado „Standardo de la paco“.

Cv. L.



Infanoj el II grupo kun muzikgvidantino Irina Radkova jam kantas Esperante.

Foto: Ivko Getov



DEZIRAS
KORESPONDI

En tiu numero de „Bulgara Esperantisto“ ni ebligas al glerantoj trovi amikojn intersiaj samaguloj el Bulgario, Hungario, Pollando kaj USSR.

BULGARIO

Kvar 10-jaraĝaj amikinoj kolektas BK kaj kalendaretojn: Tatjana Cvetkova — 2260 Svoĝe, str. „R. Knjaginja“ 2; Ivanka Minčeva — 2260 Svoĝe, str. „Cavdar“ 11; Petja Ivanova — 2260 Svoĝe, str. „Druĝba“ 20; Vasilka Koleva — 2260 Svoĝe, str. „Rila“ 11.

17-jaraĝaj lernantinoj deziras amikan korespondadon: Biserka Velinova — Sofia 1324,

kv. „Moderno predgradie“, str. „Topola“ 9; Marinela Cvetanova — Sofia 1440 kv. „Emil Markov“, str. „Dejan Beliŝki“ 2, bl. 104, vh. A; Ofelia Petrova — Sofia 1440, kv. „Emil Markov“, str. „Dejan Beliŝki“, bl. 107 — Stipcarovi.

Nina Ĝalabova (17-jara) — 4002 Plovdiv ul. „General Kolvev“ 17E — pri fremdaj lingvoj; germana, rusa kaj itala, BK.

HUNGARIO

Annamario Varga (11-jara) — H-9812 Telekes — Kossuth ut. 29 — kolektas BK.

Andrea Toth (15-jara) — H-7400 Kaposvar, Peter Pazmany str. 104 — pri turismo, muziko, kantado, BK.

POLLANDO

Roman Michalik (17-jara) — P-58-100 Swidnica, Witoszow Wol. 137 — pri turismo, Esperanto kaj muziko.

Lukasz Uniejewski (11-jara) —

Pl-44-335 Jastrebie Zdroj, ul. Opolska 8/26 — pri arkeologio, naturo, ŝako, libroj, PM.

Slawomir Majkowski (18-jara) — PL-11-706 Rybno woj. Olsztyńskie ul. Ogwodowa 27 — pri lingvoj, geografio kaj muziko, pri interŝanĝo de BK kaj PM.

SOVET-UNIO

Gelernantoj — 11-12-jaraĝaj — 614022 Perm, Sivkova, 3, Skola 122, „Esperanto“ — serĉas leteramikojn.

Arnas Palaima (16-jara) — SU-235308 Litovio, Panevezys, Danutes 40—36 — pri zoologio, fotografado, filmado.

Aleksandra Kuzmina (16-jara) — SU-354034 Soĉi, str. Maĉestinskaj domo 13, loĝ. 54 — pri muziko, dancoj, literaturo.

30 gelernantoj 12-13-jaraĝaj — SU-630055 Novosibirsk, mez. lernejo 61 — serĉas leteramikojn.

Cefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (viccefredaktoro), Lidia RAEVA (lingva redaktoro), Maria JANKOVA (redakta komitato: Marin BAČEV, Mariana ELENOVA, Dimitar HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV
Korektisto: Jordan CALJOVSKI
Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado Eldonkvanto — 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303-Sofio, Bulgario

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66
1000-Sofio

875

Titano de la naciliberiga batalo

LA KREDAS DE LA BULGARA KOMUNUMO

Mi kredas je la unika komuna forto de la homa gento sur la terglobo, kiu forto kreas bonon.

Ankaŭ je la unueca komunista sociordo, savonta per frata laboro kaj egaleco ĉiujn popolojn de la suferoj kaj ĉagrenoj dum jarcentoj.

Ankaŭ je la hela vivokrea spirito de la racio, plifortiganta la koron kaj la animon de ĉiuj homoj por la prospero kaj la triumfo de la komunismo pere de la revolucio.

Ankaŭ je la unueca kaj nedisigebla patrolando de ĉiuj homoj kaj komuna progreso de ĉiuj bienoj.

Mi kredas je la unika hela komunismo, forigonta la sociajn malperfektaĵojn.

Mi atendas la vekigon de la popoloj kaj la estontan komunisman sociordon en la tuta mondo.

Galac, la 20-an de aprilo 1871

MIA PREGO

„Benata estu Dio nia...”

Dio mia, justa Dio!
Ne vi en ĉiela foro,
mi nur preĝas al vi, Dio,
kiun sentas mi en koro...

Ne vi, kiun priadoras
pastroj kaj monaĥoj piaj,
kiun per kandeloj gloras
ortodoksaj brutoj niaj;

Ne vi, kiu el kot' faris
viron kaj virinon lerte,
tamen por la hom' preparis
sklavan vivon sur la tero;

Ne vi, kiu sanktoleis
reĝojn, papojn, patriarkojn,
kaj mizeran vivon kreis
por malriĉaj miaj fratoj;

Ne vi, sklavon instruanta
preĝi dum suferoj krudaj,
ĝis la tomo lin nutranta
sole per esperoj nudaj;


Ne vi, Dio de l'trompuloj,
de l'tiranoj malhonoraj
ne, idolo de l'stultuloj,
de la malamikoj homaj!

Sed vi, Dio de l'racio,
defendanto de la sklavo,
kies tagon la nacioj
baldaŭ festos kiel savon!

Vi al ĉiu vivan amon
al liber' inspiru, Dio —
por ke kontraŭ la tiranoj
de l'popolo luku ĉiu!

Faru manon mian ŝtalo,
armu min per fera forto:
en la fajro de l'batalo
trafu ankaŭ min la morto!

En fremdlando vi ne lasu
ardan koron velki, Dio —
mia voko ne trapasu
kvazaŭ tra dezerto kriol...



Ne estas en Bulgario homo, ne konanta la nomon de Hristo Botev. Li estas simbolo de batalanto, oferinta sian vivon por la homa justo. Botev estas modelo de popola defendanto, entute sinofera en la batalo por libero. La plej granda parto de liaj versaĵoj eniris en la bulgaran parolan verkaron kiel flugilhavaj popolaj proverboj. Ili eĉ tiel estas verkataj: en la stilo de la popola poezio, malgraŭ ke ili distingiĝas de ĝi pro la forta individueco de ilia aŭtoro.

Hodiaŭ la loko, kie Botev pereis, estas sankta por la bulgara popolo, tien ĉiujare en la tago de lia perejo kunvenas multmila pilgrimantaro al popola mitingo. Tiu ĉi tago — la 2-a de junio — estas proklamita en Bulgario Tago de l'batalantoj falintaj en batalo kontraŭ la osmana sklaveco, kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo.

Kio faras el Botev sanktan nacion standardon, en daŭro de 110 jaroj post lia morto, kiam jam kelkaj generacioj dividas nin de li, kiam la bildo de a vivo en Bulgario fundamente ŝanĝiĝis kompare kun la bildo de lia tempo? Pro kio li, kiu estas naskita antaŭ pli ol cent jaroj en la kondiĉoj de la feŭda otomana imperio, estas tiel juna ankaŭ hodiaŭ, en nia socialisma lando, kaj estas neanstataŭigebla en ĉiu bulgara koro?

Grandegan rolon por tio ludas lia nemaljuniganta poezio, kiu estas senmorta kaj ĉiam juna kiel ĉiu granda poezio. Sed la poezio de Botev estas varmigita de lia revolucia ideologio, ĝin neimageble altigis lia dumviva heroaĵo, kaj de lia legenda morto kaj tio donas al ĝi allogan ĉarmon.

Omago al la 110-a datreveno de la historia heroaĵo de Hristo Botev kaj de liaj kunbatalantoj, multaj el kiuj pereis en kruela sanga batalo kun turkaj armestroj sur montopinto Okolĉica en la Balkano, en Vraca-regiono, la eldonejo Sofia-Pres aperigis volumon de elektitaj verkoj de Hristo Botev en Esperanto (versaĵoj, artikoloj, felietonoj), tradukitaj de Ivan Dobrev kaj Ivan Sarafov, sub la redaktado de Hristo Gorov.

